

10 000 – 49 999 paŝoj – du baladoj

& Johano la Brava:770

& Toldi:812

& Johano la Brava:

< Per melodioj #A rekante dufoje 15 el 29 batoj por strofo, entute 21 460 paŝoj dum 3 horoj kaj 30 minutoj, #B rekante 29 el 53 batoj por strofo, entute 19 610 paŝoj dum 3 horoj kaj 25 minutoj, kaj #C rekante dufoje 12 el 23 batoj por strofo, entute 17 020 paŝoj dum 3 horoj kaj 40 minutoj. Verkis Sándör Petöfi (1844). El hungara tradukis Kálmán Kalocsay (1923 kaj 1948). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj sed hungareskaj melodioj kaj novaj rekantaĵoj.>

(#Melodio:

(

(#A: <1,7:29×2> (/dodo domi sofa mido reso o mimi; soso somi fafa mire mifa a soso;

(#Rekantaĵo dua: soso somi fafa mire somi i fafa; dodo domi sofa mido reso o dodo o;))×2)

?

(#B: <1,5:53> (/dodo Tido redoTido refa3 mimi; redoTido refa mire doTi LaLa;

(#Rekantaĵo unua: mi3re dore mi re doTi LaTi La So mi mi i;)

(/mila lala titi soso fiso o mimi; mila lala titi soso o mire mimi;

(#Rekantaĵo dua: lare rere mimi doLa Tido redo La La; lare rere mimi doLa redo Tido LaSo La a;))

?

(#C: <1,3:23×2> (/LaLa LaTidore mila3 somi LaLa3; lala sofi3 soso ti3la mire3 mimi;

(#Rekantaĵo: lala mimi tila3 mimi; sofi remi do; La So doLa LaSo3 La)

)×2)

)×370) +

(&Strofoj:

,& Unua parto:

'1

(&A: /Ard-radie brilas la vizaĝo suna ; de l' ĉiela supro al ŝafisto juna.

(×:)

Estas superflue, ke ĝi tiel ardas, ; la ŝafist' sen tio tro varmege fartas.

(×: **En la lando elfa regas ĉiam belo ; al Johano Brava estas vivocelo.**))

?

(&A: /Ard-radie brilas la vizaĝo suna ; de l' ĉiela supro al ŝafisto juna.

(×:)

Estas superflue, ke ĝi tiel ardas, ; la ŝafist' sen tio tro varmege fartas.

(×: **En la lando elfa regas ĉiam belo ; al Johano Brava estas vivocelo.**))

?

(&C: /Ard-radie brilas la vizaĝo suna ; de l' ĉiela supro al ŝafisto juna.

(×: **Flugas birdo, frumatene ; blovas varma vent', ; flugas birdo al la sun'.**)

/Estas superflue, ke ĝi tiel ardas, ; la ŝafist' sen tio tro varmege fartas.

(×: **Flugas birdo, frumatene ; blovas varma vent', ; flugas birdo al la sun'.**))

'2 Ama fajro brulas en la juna sino, ; dum li paŝtas gregon ĉe la vilaĝ-fino. Dum la greg' paŝtiĝas tie, freŝherbare, ; li sur sia peltu kuŝas nenifare.

....

'3 Ĉirkaŭ li odoron flora mar' elspiras, ; Sed atenton lian floroj ne altiras. En ŝtonĵet-proksimo rivereto fluas, ; la rigardon miran tien ĝi algluas.

'4 Sed ne de l' rivero al la brilo onda, ; sed en la rivero al knabino blonda, De l' knabino blonda al la svelta korpo, ; al harplektoj longaj, ronda brusto-volbo.

'5 Ĝis genu' refalde ŝi al jupon havas, ; ĉar en la rivero ŝi tolaĵon lavas. Blankas super akvo genueto bela, ; jen por nia Janĉi la plezur' ĉiela.

....

'6 Ĉar sur la herbejo
ŝafgardisto nia ; Janĉi
Kukorica estas, ne alia.
Kaj ŝui, kiu lavas tolon en
rivero, ; estas Ilnjo, lia perla
kor-juvelo.

'7 "Perla kor-juvelo, Ilnjo, mia
ĉio!" ; Janĉi Kukorica diras
kun pasio. "Alrigardu do
min, en la tuta mondo ; ja vi
estas mia sola ĝojo-fonto.

'8 El prunel-okuloj ĵetu al mi
lumon, ; venu el la akvo, venu
en brakumon, venu al la
bordo, nur momenton fuĝan! ;
Mi l' animon kisos sur la lipon
ruĝan."

'9 "Sciu, kara Janĉi, mi elirus
ĝoje, ; se ne tiel urĝus la labor'
ĉi-foje. Mi rapidas, male
spertos mi insulton, ; stifinfan'
mi estas, tio diras multon."

'10 Tiel blonda Ilnjo finis la
parolon, ; kaj ŝi vigla-mane
lavis plu la tolon. Sed nun
la ŝafisto levis sin, kaj iris ; al
ŝi pli proksimen, kaj alloge
diris:

'11 "Venu, ho kolombo, turto
mia eta, ; pri l' brakum' kaj
kisoj tuj mi estos preta. En
proksim' ne estas via panjo
stifa, ; ho ne lasu do min morti
kis-soifa."

'12 Li ŝin el la akvo logis
dolĉ-parole, ; kaj ŝin
ambaŭbrake ĉirkaŭprenis
mole, Kisis ŝian buŝon nek
du-, nek cent-foje, ; nur la
bona Dio scias, kiomfoje.

,& Dua parto:

'13 Sed la temp' rapidis dume.
La vespero ; jam purpuris sur
la ondoj de l' rivero.
Stifpatrinon hejme furiozo
skuas. ; Kie la knabino? Kie ŝi
malfruas?

'14 Tian penson havis la
patrin' malica, ; kaj post pens'
la vorto estis jam laŭvica,
kaj ĝi ne tre gaje sonis, tio
klaras. ; "Vidu mi, ve al ŝi, se
ŝi nenifaras."

'15 Ve nun al vi, Ilnjo, eta orf-
animo, ; sorĉistin' furia jen
jam en proksimo! Vasta
ŝia pulmo, larĝa ŝia buŝo... ; el
amsonĝ' vin vekas krioj kiel
puŝo:

'16 "He, malĉasta ino, he,
estaĵ' senhonta, ; tion vi
kuraĝas por indigno monda!
.... Vi la karan tempon ŝtelas
sur la bordo ; per amaĉ'
malpia? Ho, vin portu for
do..."

'17 "Sed nun jam sufiĉe,
panjo, ke vui bruas, ; fermu
vian buŝon, aŭ mi mem ĝin
gluas, tiel vi ofendu Ilnjon
eĉ per tuŝo: ; Viaj restaj dentoj
falos el la buŝo!"

'18 Tiel ekdefendis de l' insult'
sovaĝa ; l' amatinon treman la
ŝafist' kuraĝa. Poste, dum
l' okuloj en kolero dronis, ; al
ĉi dir' minace jenon lin
aldonis:

'19 "Se ne volas vi, ke via
dom' ekbrulu, ; tiun orfulinon
povran ne torturu! Ŝi ja sin
lacigas, peze peni devas, ; kaj,
krom seka pano, kion ŝi
ricevas?

'20 Kaj nun iru, Ilnjo, langon
vi ja havas, ; por al mi
elplendi, se insult' vin trafas,
.... kaj pri l' propraj agoj
zorgu nur, panjaĉo, ; ĉu vi
virtmodelo estis dum junaĝo?"
.....

'21 Janĉi Kukorica nun la
pelton levis, ; iris, ĉar la
gregon li kolekti devis. Ho
sed kiel granda estis la ektimo:
; Nur apenaŭ kelkaj vagis en
proksimo.

,& Tria parto:

'22 Jam la suno tuŝis la terrandan zonon, ĝis de l' greg' retrovis Janĉi la duonon. La duon' alia mankis de l' ŝaf-trupo. ; Kiu ĝin forrabis? Ĉu ŝtelist' aŭ lupu?

'23 Kie ajn ĝi estas, ĝi ja estas fore. ; Serĉi kaj malĝoji - same senvalore. Kion do nun fari? Fine li decidis, ; La ŝafar'-restaĵon al la hejmo gvidis.

'24 "Havos nun vi, Janĉi, havos vi ne benon!" ; Dum paŝad' malgaja li pensadis jenon. "Eksplodeblas mia mastro ja sen tio, ; kaj eĉ nun... sed estu laŭ la vol' de Dio".

'25 Tion ĉi li pensis, li pli eĉ ne povis, ; ĉar li kun lagrego jam eĉ kort' sin trovis. La grumblema mastro antaŭ l' pordo staris, ; ŝafojn nombri, kiel li kutime faris.

'26 "Lasu la nombradon, mastro mia bona, ; kial nei, mankas pli ol part' duona. Pente mui bedaŭras, sed jam kiel ŝanĝi!" ; Tiel alpariolis sian mastron Janĉi.

'27 Kaj la mastro ditris al li murmurvorte, ; dum li la lipharojn kaptis, tordis forte: "Bub', ne stultu! Mi la ŝercon ne toleras! ; Ne incitu min, se pacon vi preferas."

'28 Montris sin: ne ŝerco estas la afero. ; Preskaŭ l' mastro perdis menson pro l' kolero. Kvazaŭ rabiante en furioza fajro, ; kriis: "He, forkegon, piki tra l' kanajlo!

'29 Vidu la ŝteliston, la pendigindulon! ; Korva bek' elpiku al li la okulon! Ĉu por nutr', eduko tion mi meritu? ekzekutan ŝnuron nepre ne evitu!

'30 Mi plu vin ne vidu! For de mia korto!" ; Tiel el la mastro ŝprucis vort' post vorto. Kaj jam dikan vekton kaptis li rapide, ; kaj post Janĉi kuris kun ĝi venĝ-avide.

'31 Janĉi Kukorica antaŭ l' mastro kuris, ; sed ne tial ĉar lin eble tim' teruris. Kontraŭ dudek viroj je la fort' li fidis, ; kvankam dudek vintrojn ĝis nun li ne vidis.

'32 Kuris, ĉar li sentis kaj rekonis ĝuste, ; ke nun lia mastro koleriĝis juste. Kaj, se lukt' okazus, ĉu li batu homon, ; kiu patre prenis lin en sian domon?

'33 Kuris li, ĝis perdis lia
patro spiron, ; poste iris,
haltis, kaj reprenis iron,
dekstren kaj maldekstren.
Kien do li volas? ; Li ne scias.
Kapo en konfuzo bolas.

,& Kvara parto:

'34 Kiam ĉiuj ondoj iĝas jam
speguloj, ; kie sin rigardis
brilaj stel-okuloj, sub
ĝarden' de Injo janĉi sin
retrovis. ; Kiel li alvenis, scii
mem ne povis.

'35 haltis li, kaj prenis sian
ŝalmon karan, ; kaj ekludis
sian kanton plej amaran.
La rosgutoj sur la arboj kaj
herbejoj ; eble estis larmoj de
l' kompataj steloj.

'36 Injo jam ekdormis. La
kuŝej' surtera ; estis en
vestiblo, laŭ kutim' somera.
..... Kiam ŝi ekaŭdis la konatan
kanton, ; ŝi leviĝis, kuris vidi
la amanton.

'37 Sed la vid' de Janĉi ŝin ne
tre konsolis, ; plie ektimigis.
jene ŝi parolis: "Kial vi,
karulo, palas kiel luno ;
malkreskanta en la nokto de
aŭtuno?"

'38 "Ho trezor', jen kial palas
mi malĝoje ; Viajn dolĉajn
vangojn vidas mi lastfoje."
"Janĉi, min timigis via vid' sen
tio, ; ĉesu tiajn diri, je la am'
de Dio!"

'39 "Laste mi vin vidas, ho
pruintemp' de l' koro, ; laste al
vi plendis mia ŝalm-sonoro,
..... laste mi vin kisas,
ĉirkaŭprenas ame. ; Ve, mi vin
forlasas, iras por-ĉiame."

'40 Kaj nun la povrulo ĉion
interpretis, ; al la brust' de l'
plora knabinet' sin ĵetis,
ŝin brakiumis, dume turnis for
l' okulojn: ; La knabin' ne vidu
liajn larmorulojn.

'41 "Do nun, bela Injo, mia
dolĉa floro, ; jam adiaŭ, gardu
min en la memoro, Se vin
vidos frondon, per la vent
peliĝan, ; pensu la amanton,
migran, malfeliĉan."

'42 "Do nun, kara Janĉi, iru, se
necese, ; mia bona Dio gardu
vin senĉese, se vi vidos
floron, sur vojmez' paliĝan, ;
pensu l' amatinon, velkan,
malfeliĉan."

'43 Kaj disiĝis ili: branĉo kaj
folio, ; ambaŭ korojn kovris
vintro per glacio. Al ŝi
densaj larmoj sur la vang'
ruliĝis, ; per maniko vasta
Janĉi ilin viŝis.

'44 Li ekiris, iris nur sen voj-
elekto, ; estis ja egale, kien la
direkto... Lin paŝtistaj
buboj fajfe preterflankis, ; la
bovaro tintis, - li eĉ ne
rimarkis.

'45 La vilaĝ' postrestis en la
malproksimo, ; la paŝtistaj
flagraj dronis trans vidlimo,
..... kiam li returnis laste la
okulon, ; li - fantomon nigran
- vidis nur la turon.

'46 Se apud li estus iu sur la
vojo, ; li ekaŭdus pezan
ĝemon de malĝojo. La
aeron tranĉis gruoj, sed tre
alte, ; ĝin nek ili aŭdis, flugis
plu senhalte.

'47 Iras li, pluiras tra l' silent'
noktmeza, ; nur surŝultre
zumas lia pelto peza,
kredis li, ke l' pelto pezas sur
la kolo, ; kvankam pez' plej
granda estis lia koro.

,& Kvina parto:

'48 Jam la sun' leviĝis, for la lunon sendis, ; ĉirkaŭ li la stepo mare sin etendis. De la sunleviĝo ĝis sunmalapero ; sternis sin senlima, ebenegatero.

'49 Arbojn, arbetaĵojn, florojn li ne vidis, ; brila roso sole sur herbetoj ridis. Per radi' unua de la lum' de tago ; flanke ekruĝetis junk-bordera lago.

'50 sur la lago-rando, meze de junkejo ; manĝon por si serĉis longa-kola ardeo. Meze de la lago fiŝist-birdoj, kroze, ; kun flugiloj longaj, ĉasis senripoze.

'51 Janĉi iris, iris, kun la propra ombro, ; de mallumaj pensoj kun la granda nombro. Jam la tuta stepo per sunbril' sin vestis, ; sed en lia koro nokt' de noktoj restis.

'52 Nun la sun' atingis al plej supra grado, ; kaj komencis Janĉi pensi pri manĝado. Manĝon nur hieraŭ en ĉi temp' li prenis, ; lin la lacaj kruroj jam apenaŭ trenis.

'53 Li sidiĝis, serĉis en tornistro ion, ; trovis lardon, panon, kaj li manĝis ĉiom. Lin rigardis blua firmament' kaj brula ; suno, kaj miraĝo: feo bril-okula.

'54 Al li bone gustis ĉi manĝeto taga, ; li soife iris al la bordo laga, Ĉapel-randon trempis, el ĝi gorĝe trinkis, ; la soifon brulan tiel li estingis.

'55 Foren de la bordo iri li ne emis, ; ĉar palpebrojn liajn jam la dormo premis, li fosaĵon talpan uzis por kuseno, ; refreŝigi fortojn svenajn de la peno.

'56 Lin la song' alportis, de kie li venis, ; Li en siaj brakoj sian Iljon tenis, Kaj sin al ŝi klinis, kisi jam intenca, ; Jen forpelis songon tondra son' potenca.

'57 Li rigardis larĝe-longe de l' kamparo... ; Granda fulmotondro estis en preparo. Venis la tempesto kun subit' egala, ; Kiel al li venis la dolor' fatala.

'58 En mallum' sin vestis jam la tuta mondo, ; Falis fulmoj, tondris la ĉiela rondo. La nub-defluiloj fine sin malfermis, ; Kaj sur sin la lago densan ŝaŭmon sternis.

'59 Janĉi sin apogis je l'
bastono granda, ; Li deturnis
flankojn de l' ĉapel' vastranda,
..... La longharan pelton prenis
kun transturno, ; Tiel
fiksrigardis al tempesta
sturmo.

'60 La tempest' subite venis,
furiozis, ; Sed kun la subito
sama ekripozis, La nubar'
ekflugis kunfacila vento, ;
Ĉielark' ekbrilis trala oriento.
.....

'61 Nun la pelton Janĉi
senakvigis skue, ; Post desku'
de l' akvo li ekiris plue,
Por ripoz' la suno jam en liton
venis, ; Lin eĉ tiam plue la
piedoj trenis.

'62 Lin piedoj trenis en
arbaran mezon, ; De l' arbaro
densa en obskuran mezon.
Korva grak' salutis tie la
migrulon, ; Ĝi de bestkadavro
manĝis la okulon.

'63 Nek arbar', nek korvo lin
ja embarasis, ; Janĉi Kukorica
sian vojon pasis. Meze de
l' arbaro, al la voj' malluma, ;
Sendis sian brilon flava lumo
luna.

,& Sesa parto:

'64 Jam la marŝ' de l' tempo al
noktmez' proksimis, ; Kiam
antaŭ Janĉi eta lum' ekglimis.
..... Li, irinte al ĝi, vidis tre
malklara ; Fenestret' ĝi estas
en la fund' arbara.

'65 Janĉi pene pensis post la
ekrigardo: ; "Tre verŝajne
brulas tiu lum' en ĉardo.
Certe tiel estas. Ho, mi dankas
Dion. ; Mi eniros, nokte mi
ripozos iom."

'66 Sed eraris janĉi: ĝi ne
ĉardo estis, ; Sed dek du
rabistoj en la domo nestis.
Kaj la domo staris tute ne
malplene, ; La dekdu rabistoj
ĉiom estis ene.

'67 Nokt', rabband', pistoloj,
hakaj-pikaj feroj, ; - Ni
pripensu bone - ja ne ŝerc-
aferoj. Sed la brust' de
Janĉi firman koron kaŝis, ;
Jen. li grandkuraĝe inter ilin
paŝis.

'68 "Donu Di' vesperon bonan
kaj feliĉan", ; Li al ili diris ĉi
saluton riĉan. Tuj armilon
kaptis ĉiu rabbandano, ; Kaj
lin ĉirkaŭfermis. Kriis
kapitano:

'69 "He, kiu vi estas malfeliĉa homo, ; Trapaŝinta sojlon de ĉi tiu domo? Ĉu vi havas panjon kaj edzinon? Sciu, ; Ke vin plu revidos el ili neniu!"
.....

'70 En Janĉi ne batis pli rapide koro, ; Nek pli pala iĝis lia vang-koloro. Al la kapitana dir' minac-esprima ; Jene li respondis per parol' sentima:

'71 "Kiu amas ion en la vivo vanta, ; Tiu saĝe faras ja, vin evitanta. Sed al vi, ĉar vivi min ja nur ĉagrenas, ; Kiu ajn vi estas, mi kuraĝe venas.

'72 Do, se al vi plaĉas, lasu al mi pacon, ; Lasu min ĉi-nokte elripozi lacon, Kaj se ne, mortigu do min, mi atendas, ; Mian aĉan vivon ja mi ne defendas."

'73 En trankvil' atendis janĉi la respondon. ; Granda miro kaptis la rabistan rondon. Kaj la kapitano nun al Janĉi paŝas: ; "Frat', mi diros ion, kio kernon kaŝas.

'74 Hej bravul' diabla, - jen kunul' tre inda, ; Dio mem ja estis vin por ni kreinta! Vivon mi malŝatas, morton vi ne tremas: ; Vin ja ni bezonas, kun vi ni manpremas!

'75 Ŝtelo, rabo, murdo - por ni ŝerco nura! ; Kaj premion riĉan donas ŝerc' bravula: Jen barel' da oro, jen arĝenta peco. ; Nu, ĉu al vi plaĉas la kamaradeco?"

'76 Tra la kap' de janĉi strangaj pensoj ondis, ; Sed kun bonhumoro ŝajna li respondis: "Via do mi estas! Jen la man' kuraĝa! ; Ho, plej bela horo de ĉi vivo aĉa!"

'77 Diris nun la ĉefo: "Ke pli bela estu, ; Homoj, trinkfestene ni la pakton festu! Vin' el pastraj keloj estas ja abunda, ; Ni rigardu fundon de l' kalik' profunda!"

'78 Kaj sur la profunda fundo de l' kaliko ; Por iliaj mensoj estis enterigo. Sola nia Janĉi tenis sin modere, ; Malgraŭ la instigoj trinkis nur glutere.

'79 Sur rabist-palpebrojn vino dormon sendis. ; Jen la temp' por Janĉi, tion li atendis. Degfalinte kuŝis jam la band' ebria, ; Kiam li komencis per parolo tia:

'80 "Bonan nokton! Vekos vin plu jam nenio, ; Krom la trumpetsono ĉe la juĝ' de Dio. Vi estingis ege multajn viv-kandelojn, ; Sendos mi eternajn al vi nokt-malhelojn.

.....

'81 Nun al trezorejo! La tornistron, plene ; Al vi, kara Injo, portos mi revene. Vin la stifpatrino sklave plu ne ligos, ; Dio mem deziras: mi vin edzinigos.

'82 Meze de l' vilaĝo mi la domon faros, ; Vi, edzino ĉarma, tie kun mi paros. Kaj ni vivos tie en feliĉa amo, ; Kiel en Edeno Eva kun Adamo.

'83 Dio kaj Kreinto! Kiel mi parolas! ; Monon malbenitan mi forporti volas? Eble sang' makulas ties ĉiun pecon. ; Per trezoro tia havu mi riĉecon?

'84 Ĝin mi eĉ ne tuŝas, for, for la iontenco! ; Ja ne difektiĝis mia konscienco. Kara Injo, portu ŝarĝon plu en solo, ; Vin konfidu, povra, al la Dia volo."

'85 Nun, post kiam Janĉi ĉion ĉi eldiris, ; kun kandel' brulanta el la dom' li iris, kaj ĝin ekbruligis ĉe la kvar anguloj. ; Ĝin rapide mordis la koleraĵoj.

'86 La tegmento brulis jam en ĉiuj flankoj, ; Al ĉiel' svingiĝis ruĝaj flamo-langoj. La ĉielon puran nigra fum' vualis, ; Kaj de l' plena luno la vizaĝ' ekpalis.

'87 Pro la nekutima lum' de dombruligo ; Timigite flugis la vespert' kaj strigo, la susur' rapida de flugad' ilia ; Rompis la trankvilon de la tend' folia.

'88 La unuan brilon suno eklumanta ; Ĵetis sur ruinojn de la dom' fumanta. Kiam tra l' fenestraj truoj ĝi englitis, ; Ĝi skeletojn fulgajn de l' rabistoj vidis.

,& Sepa parto:

'89 Janĉi jam tre fore vagis tra la lando, ; Li plu eĉ ne pensis pri la hejm' de l' bando. Jen okulojn liajn foje brilo trafis, ; Suno la radiojn sur armilojn pafis.

'90 Ho, soldatoj venis, bela trup' husara, ; Sur armil' ilia dancis brilo klara; La ĉevaloj ternis, per la hufoj bruis, ; Belhararajn kapojn fierege skuis.

'91 Dum al Janĉi ili pli proksimen venis, ; Pene li la koron en la brust' retenis, Pensis: "Hej, se nun mi estus akceptata, ; Kia ĝojo estus por mi viv' soldata!"

'92 Kiam Janĉi estis jam ĉe l' skadra flanko, ; Li ĉi vortojn aŭdis de l' skadrestra lango: ; "Gardu vin, vi tretos tuj al via kapo! ; Kial vi malĝojas tiel ege, knabo?"

'93 Kaj el Janĉi venis ĝeme la respondo: ; "Vagabond' mi estas de la granda mondo; Sed se en ĉi skadro, inter vi mi rajdus, ; Kontraŭ l' brila suno fikse mi rigardus."

'94 Nun la ĉef': "Pripensu! Iras ni, baptano, ; Ne por nin amuzi, sed ja por sangbano. Turka hord' atakis ĵus la francan genton, ; Mi, por ĝin defendi, gvidas helptaĉmenton."

'95 "Des pli mi ne konas pli havindan celon, ; Ol ĉevalon rajdi, ĵeti min en selon. Se mi ne mortigos, min dolor' mortigas, ; Ho, min militiri tuta kor' instigas.

'96 Vere, mi ĝisnune nur azenon konis, ; La ŝafist-metio tion nur bezonis. Sed hungar' mi estas, do - kun rajdpasio! ; Por hungarom kreis la ĉevalon dio."

'97 Multon per la lango diris la junulo, ; Sed pli-multon diris brilo de l' okulo. Dom al la skadrestro plaĉis la konduto, ; Kaj li tuj akceptis janĉi-n je rekruto.

'98 Ho, ĉu povus pentri tion kanto-sono, ; Kion Janĉi en la ruĝa pantalojno, Kion li en jako pasamenta sentis, ; Dum li glavon brilan al la sun' etendis.

'99 La ĉevalo fajra saltis en
ĉielon, ; Kiam nia janĉi ĵetis
sin en selon, Sed li sidis en
ĝi firme kiel bloko, ; Eĉ
tertrem' ne povus movi lin el
loko.

'100 Lin la kamaradoj ĉiam pli
admiris, ; Lia fort' kaj belo
ĉiujn miri inspiris, Kie ilin
marŝis, haltis en kvartiro, ;
Ofte la knabinoj ploris ĉe l'
foriro.

'101 Sed koncerne ilin, kion
ditri pri li? ; Ja neniuj plaĉis al
Janĉi el ili, Vere, ke tra
multaj landoj iris li jam, ; Sed
al Ilnjon indan trovis li
neniam.

,& Oka parto:

'102 Nu do, marŝis, marŝis plu
la trup' husara, ; Jam atingis
mezon de la land' tataro.
Sed minacis ilin tie ĉi pereoj ;
La hundkap-tataroj venis en
armeoj.

'103 La hundkapa reĝo de l'
tatar-popolo ; Diris al la
skadro por salut-parolo:
"Kiel vi kuraĝis veni en la
landon? ; Ni - ĉu vi ne scias? -
manĝas homviandon."

'104 Granda estis timo de la
trupo nobla, ; La tatar-popolo
estis ja milobla; Bone, ke
vojaĝis ĝuste tra l' regiono ;
La bonkora reĝ' de l' saraceno
trono.

'105 Li por help' de l' skadro
penon ne domaĝis, ; Ĉar li
Hungarlandon foje travojaĝis,
..... Kiam la hungara pi-anima
gento ; Lin akceptis kore, kun
gastama sento.

'106 Kaj la reĝo gardis tion en
memoro, ; Do li tuj protektis
ilin kun fervoro. Al la reĝ'
tataro, lia bona amiko, ; Jene li
parolis por plipacemigo.

'107 "Ho amik', indulgu, lasu
la hungarojn, ; Certe vi ne
spertos de ili misfarojn,
Mi tre bone konas tiun bravan
genton, ; Pro mi, do tramarŝi
lasu la taĉmenton."

'108 "Pro vi, mi konsentas,
kamarado kara," ; Diris
mildiĝinte nun la reĝ' tataro,
..... Kaj eĉ li mem skribis la
pasporton savan, ; Ke ofend'
de trafu nian trupon bravan.
.....

'109 Fakte, la husarojn plu
nenio ĝenis, ; Tamen, ĝoje ili
al la limo venis. Ne
mirinde: kreskas tra l' mizera
lando ; Nenio krom figo kaj
krom ursviando.

,& Naŭa parto:

'110 Jam la land' tataro, vala
kaj montara, ; De lontan'
rigardis post la trup' husara.
..... Ĉar ĝi marŝis meze de l'
ital-ebenoj, ; Ombre de
densega bosk' de rosmarenoj.

.....

'111 Tie ĉi ne estis okazaĵ' por
noto, ; Krom ke luktii devis
kontraŭ frost' la roto, Ĉar
eternan vintron havas Italio, ;
Estis marŝ' tra nura neĝo kaj
glacio.

'112 Sed de la hungaroj
granda fort' natura ; Venkis la
turmentojn de la frost' terura,
..... Krome, se la frosto ilin
jam tro ĝenis, ; Ili la ĉevalojn
sur la dorso prenis.

,& Deka parto:

'113 Tiel ili marŝis al la pola lando, ; Kaj de tie al la hinda limorando, Jam najbaras franca lando al la hinda, ; Sed la intervojo - ne tre dezirinda.

'114 Meze de Hindujo nur montetoj estas, ; Sed pli kaj pli ĉiam la montetoj kreskas, Kiam ni atingas limon de l' du landoj, ; Tie jam ĉielon boras montgigantoj.

'115 Kompreneble, ŝvito de l' husaroj gutis, ; Jakon kaj kravaton ili de si ŝutis, Kiel ne, je Dio! Sunon vidis ili ; En proksimo mejla suer kapo brili.

'116 Tie nur aeron nia trup' manĝaĉis, ; Kaj ĝi tiel densis, ke ĝin ili maĉis. Strange ili prenis, kion ili trinkis, ; Soifante, akvon el la nuboj vringis.

'117 Fine sur la supron venis la rajd-svarmo, ; Jam nur nokte marŝis pro la arda varno. Marŝ' malrapidiĝis, ĉar minacis falo: ; Ofte per la steloj stumblis la ĉevalo.

'118 Nun, dum ili vagis inter stela denso, ; Tra la kap' de janĉi iris jena penso:

"Kiam stel' defalas - onidir' rakontas -, ; Ies vivon morto sur la ter' distondas.

'119 Danku la feliĉon, patrinaĉ' malpia, ; Ke mi nun ne scias, kiu stel' la via! Vi plu ne turmentus mian koranĝelon, ; Ĉar mi tuj malsupren ĵetus vian stelon."

'120 Poste ili marŝis sur deklivo monta, ; La montaro estis jam malaltiĝonta. Ankaŭ l' varm' terura pli kaj pli jam ĉesis, ; Dum vojaĝ' ilia en francuj' progresis.

,& Dekunua parto:

'121 Francolando estas mirindaĵo tera, ; Mem la paradizo, Kanaano vera,
Riĉa maĉ' por dentoj de la turk'popolo, ; Tial ili venis kun rabema volo.

'122 Kiam la husaroj venis al la lando, ; Ĉie en ĝi rabis jam la turka bando, El preĝejoj predis oron kaj juvelojn, ; Kaj malplenaj lasis ĉiujn vinokelojn.

'123 Ĉie urboj flagris kun timiga brilo, ; Kiuj kontraŭvenis, mortis per arnmilo. De l' palac' la reĝo fuĝis, forpelita, ; La filinon solan rabis turk' bandita.

'124 Tiel la franc-reĝon nia trup' renkontis, ; Li en sia propra regno vagabondis.
Kiam la husaroj vidis lin ĉi-stata, ; En okuloj ĉiuj sidis larm' kompata.

'125 Jene sonis vortoj de la reĝ' sentera: ; "Ĉu ne, ho amikoj, kia stat' mizera!
Mi pri riĉo povis kun Dario veti, ; En mizer' plej granda devas nun vegeti."

'126 Por konsoli, diris al li la skadrestro: ; "Lasu la malĝojon, Reĝo kaj Majesto, Ni la malpiulojn igos danci plore, ; Kiu vin ofendis tiel malhonore.

'127 Ni ripozos iom tra ĉi nokt' en paco, ; Ĉar prom longa vojo premas nin la laco, Sed se l' suno morgaŭ sur ĉiel' ekiros, ; Ni perditan landon por vi reakiros."

'128 "Sed la filnjo kara, filnjo kompatinda, ; Kie, kiam <i>ŝin</i> mi estos retrovinta? Ŝin de mi la estro de la turkoj rabis, ; Havu ŝian manon, kiu ŝin elsavis."

'129 Por la trup' hungara jen instigo grava! ; De esper' varmiĝis ĉiu koro brava,
Ĉiu kap' fervoris la decidon forĝi: ; Aŭ mi ŝin elsavos, aŭ mi mortos por ŝi.

'130 Janĉi Kukorica eble nur en solo ; Estis neaŭdanto de la reĝ-parolo, Sed tra lia kapo pens' alia boris, ; Li pri sia kara Ilnjo rememoris.

,& Dekdua parto:

'131 Kaj la sun' leviĝis laŭ kutim' matenon. ; Sed ne ĉiutage spertis tian scenon. Kian ĝi ekaŭdis, kian ĝi ekvidis, ; Kiam ĝi terrande por moment' eksidis.

'132 Kun alarma krio somis voĉ' trumpeta, ; Ĉiu saltleviĝis por batali preta, Kaj akriĝis bone sian glavo-ŝtalon, ; Kaj per viglaj manoj selis la ĉevalon.

'133 Mem la reĝo volis, kun obstina spito, ; Rajdi kun la skadro, lukti en milito, ; Sed nun la hungara ĉefhusaro saĝa ; Ĉi konsilon donis al la reĝo aĝa:

'134 "Reĝa moŝto, restu for de la atako, ; Lukti jam malforta estas via brako. Ja la tempo al vi la kuraĝon lasis, ; Sed la fort' - domaĝe - kun ĝi jam forpasis.

'135 Do, post Di', konfidu nin pri la afero. ; Ni promesas al vi, ke ni ĝis vespero Ĉiujn turkojn pelos el la regiono, ; Kaj vi povos sidi sur la reĝa trono."

'136 Kaj nun la husaroj en la selon saltis, ; La rabantan hordon serĉi ili startis, Ne tre longe seerĉis, trovis la serĉiton, ; Per sendit' deklaris al ĝin la militon.

'137 La sendit' revenis, la trumpet' signalas, ; Kun terura muĝo oni ekbatalas. Krio de la gorgoĝoj, tinto de la ŝtalo ; Estis ĉe l' hungaroj signo por batalo.

'138 Flankojn de l' ĉevaloj ili akre spronis, ; Hufobatoj tondraj sur la tero sonis, Aŭ bateĝis eble mem la kor' de l' tero ; Prom la bru' minaca, plena de danĝero?

'139 La sep-ĉevalvosta ĉefpaŝa' kruela ; Havis ventron kvazaŭ kuvo kvinsitela. Lia naz' pro l' drinko estis jam purpura, ; Ke vi opinius ĝin kapsik' matura.

'140 La grandventra estro de la turka hordo ; Nun starigis tiun en batala ordo, Sed la turka trupo ŝtopnigite haltis, ; Kiam la husaroj inter ilin saltis.

'141 Ĉi atako estis ja ne serĉo nura, ; La rezulto estis konfuziĝ' terura. Jes ja, sangan ŝviton ŝvitis la turkaro, ; Ke la verda kampo iĝis ruĝa maro.

'142 Hu, varmega tago! Mil tintantajk sabroj! ; Kiel monto altis jam la turk-kadavroj. Sed la estro vivas, lia ventro ŝvelas, ; Kaj al nia Janĉi per la fer' li celas.

'143 Janĉi ja ne prenas nura ŝerco tion, ; Sed li tuj atakas, elpuŝante krion: "Frat'! Por unu homo mi vin troa trovas, ; Nepre mi du pecojn el vi fari povas."

'144 Kaj, kiel li diris, tiel tuj li agis, ; La paŝaon turkan en du pecojn hakis, Li duflanken falis de l' ĉevalo ŝvita, ; Tiel lian moŝton trafis mort' subita.

'145 Ekvidinte tion, la turkar' malbrava ; Turnis sin, rifuĝis, hop, al kuro sava. Kuris ĝi, kaj eble kurus ĝi eĉ nune, ; Se ĝin la husaroj ne atingus pune.

'146 Sed atingis ili, buĉis ĝin per glavo, ; Falis kapoj turkaj kiel la papavo. Unu rajdas nur ĝis lasta ĉeval-sprio, ; Janĉi mem ekrajdis post ĉi tiu viro.

'147 La rajdanto estis mem la paŝafilo, ; Sur genuoj liaj blankis ia brilo, Kaj la reĝidino franca estis tio, ; Ŝi, sveninte, kuŝis tie sen konscio.

'148 Longe rajdis Janĉi, ĝis li lin atingis, ; "Haltu, per diablo!" kriis, glavon svingis, "Aŭ sur via korpo pordon mi frakasos, ; Kaj tra ĝin inferenl' animaĉo pasos."

'149 Nu, la paŝafilo haltus ja neniam, ; Sed sur teron faluis la ĉeval' sub li jam, Falis, kaj la lastan spiron ĝi elpuŝis. ; Nun la paŝafilo tion ĉi elbuŝis:

'150 "Ho indulgu al mi, nobla vir' kuraĝa, ; Tuŝu vian koron mia viv' junaĝa! Jen, mi estas juna, havas vivsoifon, ; Prenu do for ĉion, lasu nur la vivon!"

'151 "Nu, kunportu ĉion, malkuraĝa sklavo, ; Morti vi ne indas ja per mia glavo, For! En via hejmo estu do heroldo ; Pri l' malbela fino de l' bandita hordo.

'152 De l' ĉeval' li saltis, kaj al ŝin li iris, ; La okulojn brilajn sinforgese miris, Kiujn ĵus malfermis la knabin' post sveno, ; Dum de ŝiaj lipoj milde sonis jeno:

'153 "Ho savint', pri l' nomo mi vin ne demandas, ; Mi nur diras al vi: mia dank' tre grandas. Kion vi nur volas, mi al vi dediĉos, Mi, se vi deziras, al vi edziniĝos."

'154 En la vejn' de janĉi sang',
ne akvo fluis, ; Do en lia koro
granda lukt' ekbruis, Sed li
kvietiĝis lukton de la koro, ;
Iljon aperigis en sia memoro.
.....

'155 Al la belulino diris mil-
influe: ; "Kara, al la patro
venu nun unue, Tie ni
pritraktos ĉion laŭ detalo." ;
Kun ŝin lante li iris antaŭ la
ĉevalo.

,& Dektria parto:

'156 La knabino reĝa kaj la
kavaliro ; Batakampon venis
ĉe la sunsubiro. Jam radioj
lastaj de la suno brulis, ; Al la
kamp' plorinda ruĝe ĝi okulis.
.....

'157 Kio estis tie? Morto
sangmakula, ; Korvoj
surflugantaj al amas' mortula;
..... Certe ĝi ne trovis tro en ĝi
plezuron, ; Baldaŭ malleviĝis
en la mar-lazuron.

'158 Ĉe la kampo estis granda
lago ronda, ; ĉiam pure brilis
ĝia akvo blonda, Sed
koloron ruĝan nun ĉi akvo
havis: ; Tie la husaroj sin de l'
sango lavis.

'159 Kaj la skadro poste, jam
fininte banon, ; Al la franca
reĝo faris akompanion,
Estis en proksimo la reĝ-
fortikaĵo, ; Tien direktiĝis sin
do ilia paŝo.

'160 Dum enmarsis ili kun
triumfa ĝojo, ; Jen, jam ankaŭ
Janĉi venis sur la vojo, Kaj
la reĝidino, apud li, simila ;
Kiel apud nubo ĉielarko brila.
.....

'161 Kiam la maljuna reĝo ŝin atingis, ; Li sur ŝian bruston ĝojtremante sinkis, Sur iliaj lipoj varma kiso bolis, ; Nur post multaj kisoj nia reĝ' parolis:

'162 "Nun jam plena estas mia ĝojo-listo, ; Homoj, iu kuru por la ĉefkuiristo, Ĉion bonan fari por la vespermanĝo, ; Je herooj inda estu la aranĝo!"

'163 "Reĝa moŝt', kuiriston voki superfluas," ; Flanke de la reĝo tia voĉ' ekbruas, "Ĉion mi preparis, faris jam subite, ; Ĝi en ĉambr' apuda estas, surmetite."

'164 La kuiristaj vortoj certe tre belsonaj ; Estis por l' oreloj de l' husaroj bonaj. Ne atendis ili multajn invitvokojn, ; Ĉe l' ŝarĝitaj tabloj vigle prenis lokojn.

'165 Kiel neniigis ili la turkbandon, ; Same kruele nun la kukon kaj viandon. Ne mirinde: kaptis ega ja malsato ; La bravulojn en la granda turk-buĉado.

'166 Migris jam la kruĉo, iris kaj revenis, ; Kiam mem la reĝon la parolon prenis: "Nun atentu pri mi, ho nobluloj bravaj, ; Ĉar ja miaj vortoj estos grave-gravaj."

'167 Ĉiuj eksilentis kun atento-streĉo, ; Por ekkapti sencon de l' parol' de l' reĝo Kaj ektrinkis, tuisis, starius li momenton, ; Poste per ĉi vortoj rompis la silenton:

'168 "Antaŭ ĉio, kio estas via nomo, ; Ho filin-savinto, brava, nobla homo?" "Janĉi Kukorica - mia nom' honesta, ; Ne hontinda, kvankam iom kampareska."

'169 Janĉi Kukorica ĉi respondon metis, ; Kaj la reĝo al li diris kaj dekretis: "Jen mi vin rebaptas, kaj per nom' pli trafa, ; Via nomo estu nun Johan' la Brava!

'170 Do, Johan' la Brava, ĉar per via mano ; Liberiĝis mia kara solinfano, Havu ŝin kaj estu ŝia edzo bona, ; Kaj kun ŝi eksidu sur la seĝo trona!

'171 Sidi sur la trono al mi jam sufiĉis, ; Mi sur ĝi griziĝis, sur ĝi maljuniĝis, La regnestraj zorgoj min jam tro lacigas, ; Do kun kor' facila ilin mi abdikas.

'172 Mi sur vian frunton mian kronon metos, ; Kaj por brila krono de vi ne plu petos,
Ol ke en palaco donu al mi neston, ; Kie mi travivos mian vivo-reston."

'173 Tiuj estis vortoj de la reĝa diro, ; Aŭdis la husaroj ĝin kun granda miro, Sed Johan' la Brava je l' propono brila ; Jene nun respondis per parol' humila:

'174 "Bonan dankon, Moŝto, pro l' bonvol' mintrita, ; Kiu estas por mi bono senmerita, Sed mi tamen devas fari la deklaron, ; Ke akcepti mi ne povas la bonfaron.

'175 Mia historio sin tre longe tirus, ; Se mi la kialon de l' rifuzo dirus, Sed mi timas, ke nur tedus vin la temo, ; Kaj tedadi estas kontraŭ mia emo."

'176 "Fil', sed ni aŭskultos! Diru do, bravulo! ; Ja senbaza estas tiu ĉi skrupulo!" Lin la franca reĝo kun insist' admonas: ; Kaj Johan' rakontis, kiel sekve sonas.

,& Dekkvara parto:

'177 "Kiel mi komencu? Do, en ord' laŭvica, ; Kiel mi akiris nomon Kukorica?
En la maizkampo mi trovita estis, ; Tial per ĉi nomo* oni min survestis.

'178 La edzin' bonkora de farmulo volis, ; Kiel ŝi multfoje pri tio parolis,
Eklabori sur la kampo de maizo, ; Jen ŝi min el sulko trovis, en ĉemizo.

'179 Ŝi min ekkompatis, ĉar mi ŝrikis ege, ; Levis min kaj prenis sur la brakojn flege,
Kaj, hejmenirante, faris la decidon: ; "Jes, mi lin edukos, mi ne havas idon."

'180 Sed koleran, krudan edzon ŝi ja havis, ; Kaj apero mia tiun ne tro ravis, Hej, kiam min hejme tiu hom' ekvidis, ; La blasfemojn buntajn dense li recitis.

'181 Ŝi lin pacigante petis por tolero: ; "Paĉjo, do ne grumblu, ĉesu la kolero!"
Se mi en pereco lasus lin sen koro, ; Povus mi esperi helpon de l' Sinjoro*?

'182 Krome, li ne sidos ĉe la dom' senfare, ; Vi ja havas farmon, bovojn, ŝafojn are. Se l' estaĵo orfa kreskos, vi ricevos ; Helpon, kaj ŝafiston dungi vi ne devos."

'183 Fine, malfacile, iel ja li cedis, ; Sed rigardon bonan al mi ne tre ĵetis. Se ne iris ĉio laŭ la ord-reguloj, ; Mia dors' pleniĝis tuj per blumakuloj.

'184 Do mi kreskis inter batoj kaj laboro, ; Ĝojon tre malmultan havis mia koro. Mia tuta ĝojo estis dum junaĝo ; Bela knabineto blonda en vilaĝo.

'185 Ŝia kara panjo mortis jam tre frue, ; Ŝia patr' edziĝis poste ankaŭ due. Ankaŭ lin forrabis baldaŭ la destino, ; Venis ŝi sub zorgon de la stifpatrino.

'186 Sola ĝojo estis tiu knabineto, ; Sola roz' en mia dorna viv-vegeto. Kiel mi en amo kaj admiro dronis! ; "Orfoj de l' vilaĝo" oni nin alnomis.

'187 Ho, mi ŝian vidon, jam kiel infano, ; Estus ne doninta por kazea flano. Kia ĝojo estis, se mi en festtagoj ; Povis kun ŝi ludi inter la geknaboj.

'188 Kaj eĉ, kiam haroj ĝermis sur la lipoj, ; Kaj pikpikis, tiklis io sub la ripoj, Hej, se mi ŝin kisis, se ŝi min karesis, ; Eĉ mondrenversiĝo min ne interesis.

'189 Multe ŝin turmentis ŝia stifpatrino, ; Dio ne pardonu ŝin pro ŝia krimo, Kiu scias, kion farus ŝi inside, ; Se ŝin per minacoj mi ne tenus bride.

'190 Ankaŭ mia vivo iĝis viv' de hundo, ; Kiam la virinon ni al terprofundo Metis, kiu iam trovis min, kaj, vere, ; Pli ol naskpatrino zorgis min sincere.

'191 Krudas mia koro, dum la vivo tuta ; Mia vang' apenaŭ estis larmo-guta, Sed nun, sur la tombon de l' edukpatrino ; Falis miaj larmoj kiel pluv', sen fino.

'192 Ankaŭ Injo, tiu orfulinkolombo, ; Ne ŝajnige ploris apud ŝia tombo, La animo bona, al ĉiel' fluganta, ; Helpis ja laŭeble al la kompatinda.

'193 Ofte ŝi diradis: "Nur atendu, karaj, ; Se la temp' alvenos, mi vin faros paraj, Kia par' vi estos! miros vilaĝanoj! ; Nur atendu iom, nur atendu infanoj!"

'194 Pene ni atendis, ke la temp' alestu, ; Estus ŝi farinta, Dio mem atestu, Ĉar ŝi ĉiam tenis sin al sia vorto, ; Ve, sed ŝi jam dormis dormon de la morto.

'195 Poste nun, post tio, ke ŝi morti devis, ; Ĉiuj sapvezikoj de l' espero krevis. Tamen en ĉi tiu stato malespera ; Daŭre firma restis nia amo vera.

'196 Ho, sed Dio havis por ni alian volon, ; Prenis eĉ ĉi tiun tristan kor-konsolon, Jen, mi perdis parton de l' ŝafar' gardata, ; Min forpelis mia mastro senkompata.

'197 Adiaŭon diris mi al Ilnjo kara, ; Al la mond' ekiris kun anim' amara, Migris vagabonde, migris mond-duonon, ; Fine mi surmetis soldat-pantalonon.

'198 Ja neniam petis Ilnjon mi per diro: ; Ŝi ne donu koron al alia viro, Nek ŝi de mi petis: restu mi fidela, ; Sciis ni: fidelo restos senŝancela.

'199 Do min ne pretendu, bela reĝidino, ; Ĉar se de mi Ilnjon rabas la destino, Plu knabina amo al mi ne necesos, ; Eĉ se min la morto tute priforgesos."

,& Dekkvina parto:

'200 Jen Johano finis sian historion, ; Kiu tre kortuŝis la aŭditorion. Lavis la vizaĝon reĝidinan ploro; El kompat' ĝi fontis, kaj el kor-doloro.

'201 Kaj la reĝ' sin turnis al li tiavorte: ; "Fil', edziĝon mi ne trudas do perforte, Sed, kion mi donas kun dankema koro, ; Vi ja ne rifuzos preni por memoro."

'202 Nun la reĝ' malfermis sian trezorejon, ; Poste li venigis sian ĉeflakeon. La plej grandan sakon ŝargis li per oro. ; Johan' eĉ ne vidis tiom da trezoro.

'203 Kaj la reĝo diris: "Nu, Johan' heroa, ; Jen pro l' filin-savo rekompenc' ne troa! Do ekiru hejmen kun la sako riĉa, ; Faru vian karan kaj vin mem feliĉa.

'204 Mi, por vin reteni, vane ja parolus, ; Scias mi, ĉe Ilnjo esti vi jam volus. Iru do, sed restu viaj kamaradoj, ; Vivu kelkajn tagojn inter amuzadoj."

'205 Kaj la reĝo estis ĉiuvorte
prava, ; Jes, ĉe Ilnjo esti volis
jam la Brava. Al la
reĝidino li adiaŭon diris, ;
Poste al la maro, al galero iris.
.....

'206 Reĝ', armeo sekvis lin ĝis
la galero, ; Multaj "bonan
vojon" flugis tra l' aero,
Kaj lin ili sekvis longe per l'
okuloj, ; Ĝis lin malproksimo
kovris per nebuloj.

,& Deksesa parto:

'207 Kun Johan' rapide iris la
galero, ; Sin al vent' apogis ĝia
larĝa velo, Sed eĉ pli
rapide flugis lia penso, ; Povis
ĝin reteni jam nenia bremsio.
.....

'208 Penso de Johano estis jen
kiela: ; "Hej, amata Ilnjo, kor-
anĝelo bela, Ĉu vi
antaŭsentas pri la ĝoja ŝanĝo?
; De trezoroj riĉa venas la
fianĉo!

'209 Fine, fine jen la vojo de
reveno, ; Ke ni par' fariĝu post
la multa peno! Riĉon donis
sorto, kaj feliĉon donos, ;
Helpon de neniuj mi de nun
bezonos.

'210 Min ja mia mastro traktis
ne tro bone, ; Sed nun mi
forĝos ĉion jam pardone.
La feliĉo propre ja de li
devenis, ; Mi lin
rekompencos, se mi
hejmenvenis."

'211 Tion ĉi li pensis, pensis
li multfoje, ; Dum rapide pasis
la galer' survoje. Sed la
bela hejm' en granda
malproksimo ; Estis, ĉar tre
foras ĝi de l' franca limo.

'212 Foje la bravulo, en
krepusk' vespera, ;
Promenadis supre, sur ferdek'
galera, Kiam al maristoj
diris kapitano: ; "Ruĝas
ĉielsubo! Venos uragano!"

'213 Sed li ne atentis pri
parolo lia. ; Supre flugis
granda aro cikonia. Estis
temp' aŭtuna. venis tra l' aero ;
Tiuj birdoj certe el la
naskotero.

'214 Li rigardis ilin kun sopiro
milda, ; Kvazaŭ bonan famon
portus aro birda Pri l'
amata Ilno, kaj pri lia kara, ;
Longe ne vidata, bela hejm'
hungara.

,& Deksepa parto:

'215 Sekvan tagon, kiel signis
ĉiel-ruĝo, ; Venis vent', eĉ
granda, kun timiga muĝo.
Ĝemis baraktante ond' de l'
oceano ; Sub la vipobatoj de la
uragano.

'216 Kaj ektimis eĉ la ŝipnar'
kuraĝa, ; Pli kaj pli furiozis la
tempest' sovaĝa. Vana
estis ĉio, ĉia streĉ' de forto, ;
Sin nenie montris savo el la
morto.

'217 Venas nigraj nuboj,
malheliĝas mondo, ; Kaj
subite tondras la ĉiela rondo,
..... Fulmoj ekzigzagis, falas
el la nuboj, ; Jen, la ŝipon
rompis unu fulm' je ruboj.

'218 Sur la mar' vidiĝas traboj,
ruboj naĝaj, ; Ŝiras for
kadavrojn ondoj la sovaĝaj,
..... Kaj Johan' la Brava kian
sorton havis, ; Ĉu l' kruelaj
ondoj ankaŭ lin forlavis?

'219 Ho, jam lia vivo sur
fadeno pendis, ; Sed savantan
brakon la ĉiel' etendis, Kaj
mirakle savis lin la dia volo, ;
Ke la ŝaŭm' ne estu lia tomba
tolo.

'220 Alten lin, altegen ond'
kolosa svingis, ; Ĝia pint' jam
frangojn de la nub' atingis.
Kaj Johan' la Brava ne hezitis
vane, ; Nubon li subite kaptis
ambaŭmane.

'221 Kaptis, kaj ne cedis, li ĝin
firme tenis, ; Kaj plej
fortostreĉe sur ĝi pendi penis,
.... Ĝis la nub' atingis al
marborda loko, ; Tie sin
delasis sur la pint' de roko.

'222 Kaj li nun unue dankis
Dion kore, ; Ke li lin de l'
morto savis grandfavore.
Ke la or' perdiĝis, tial li ne
veis, ; Bone, ke la vivo kun ĝi
ne pereis.

'223 Kaj li disrigardis, sed
nenion vidis, ; Krom ke, jen,
grifbirdo en la nesto sidis.
La grifbirdo ĝuste nun
manĝigis idon, ; Ion li
elpensis, faris tuj decidon.

'224 Li al ĝia nesto rampis
senrimarke, ; Hop, sur la
grifbirdon li saltegis arke,
Spronis ĝiajn flankojn - huŝ -
tra monto, valo ; Flugis kun
Johano stranga bird-ĉevalo.
.....

'225 La birdeg' sin skuis,
turnis en aero, ; Volis lin
depuŝi, ĵeti al la tero. Vana
pen'! Ne cedis, spitis ĝin
Johano, ; Premis flankojn,
kolon per pied', per mano.

'226 Kiom landojn ili flugis,
scias Dio, ; Foje, ĉe l' unua
mateniĝ-radio, Kiam bril'
unua de la sun' ekbrulis, ; Ĝin
la tur' de lia hejmo respegulis.
.....

'227 Sankta Dio! Kiel ĝojis
nun Johano! ; La okulojn lavis
ĝojo per larmbano. Ankaŭ
mem la birdo, pro laciĝ'
ekstrema, ; Proksimiĝis teren,
jam kun korpo trema.

'228 Fine ĝi sidiĝis sur
monteta flanko, ; Ĝi jam
preskaŭ svenis pro la
spiromanko. Nun Johan'
desaltis kaj ĝin sola lasis, ; Kaj
enpensiĝinte al vilaĝo pasis.
.....

'229 "Injo, mi ne portas oron
kaj trezoron, ; Sed al vi
reportas la fidelan koron,
Kaj vi ĝin, mi scias, faros tre
kontenta, ; Ho, tre longe
daŭris la atend' turmenta."

'230 Dume li alvenis al la vilaĝlimo, ; Tie bruon, knaron aŭdis el proksimo.
Vinbareloj bruis, veturiloj knaris, ; Sin por vinrikolto la vilaĝ' preparis.

'231 Sed li ne atentis pri l' vinrikoltontoj, ; Kaj lin ne rekonis ili ĉe renkontoj,
Tiel tra l' vilaĝo li pasadis ĝoje ; Al la domo, kie Ilnjo loĝis foje.

'232 Kiel tremis mano ĉe la pord' enira! ; Pro l' ekscito granda haltis li, senspira...
Poste li enpaŝis... Ilnjon li ne vidis. ; En vestiblo homoj tute fremdaj sidis.

'233 "Eble mi eraris" - pensis nun Johano -, ; Kaj jam ree tenis klinkon lia mano.
"Kiun do vi ŝercas?" - sonis voĉ' afabla ; De la lip' de juna virinet' agrabla.

'234 Diris li la nomon, kaj kial li venis. ; "Vere, vere, kara, kaj mi ne divenis! la sun' bruligis do vin tiel bruna?" ; Kriis surprizite la virino juna.

'235 "Ho, sed do envenu, per la am' de Dio, ; Tie mi parolos al vi tuj pri ĉio." Ŝi lin enkondukis kaj sidigis mole, ; Poste ŝi daŭrigis apud li, parole:

'236 "Ĉu vi eble min eĉ ne rekonas, kara? ; Mi ja estas tiu knabinet' najbara. Ja vi ofte vidis min kun Ilnjo kune..." ; "Sed do diru, kie estas Ilnjo nune?"

'237 Per demand' Johano ŝiajn vortojn ŝiris. ; El okuloj ŝiaj larmoj nun eliris. "Kie Ilnjo... kie? sonis kun sufero, ; "Kara oĉjo Janĉi... estas sub la tero."

'238 Bone, ke ne staris Johan' je l' momento, ; Ĉar li tuj falinta estus pro l' turmento.
Kion fari? Li nur kaptis sian koron, ; Kvazaŭ li elŝiri volus la doloron.

'239 Longe li silentis, sidis ŝtonrigide, ; Poste li ekdiris, kvazaŭ revekite: "Ho, ŝi edziniĝis, ĉu ne, diru vere, ; Ŝi prefere ĉe edzo estu, ol subtere.

'240 Tiel mi revidos ŝin je lasta fojo, ; Dolĉa por mi estos ĉi amara ĝojo..." Sed li klare vidis de l' vizaĝ' sincera, ; Ke parolo ŝia estas pure vera.

,& Dekoka parto:

'241 Kaj Johan' apogis kapon
tabl-angule, ; El okuloj liaj
larmoj fontis rule, Li, kion
li diris, ĝemis nur balbute, ; La
dolor' la voĉon baris preskaŭ
tute.

'242 "Kial en milito fali mi ne
povis, ; Kial en la maro
tombon mi ne trovis, Kial
mi naskiĝis, se min tia plago ;
Kaj turmento trafis, tia fulmo-
hako!"

'243 Fine lin torturi lakis la
doloro, ; Kvazaŭ ekdormetis
dum sia laboro. "Kiel do ŝi
mortis, kial?" sonis ĝeme. ; La
virin' respondis al li
kompateme:

'244 "Ho suferoj multaj ŝian
vivon ombris, ; Sed precipe
ŝia stifpatrin' ŝin rompis,
Nu, ŝi jam puniĝis fine pro l'
malbono, ; Vagas nun mizere,
kun almozbastono.

'245 Ankaŭ vin ŝi ege citis kaj
sopiris, ; Oĉjo janĉi; per la
lasta spir' ŝi diris: "Janĉi,
mia Janĉi, ho, vin Dio benu! ;
Transe se min vi amas, al vi
mi apartenu!"

'246 Post ĉi tio flugis el ŝi la
animo, ; Ŝia tombo estas nur
en la proksimo. La popol'
grandnombre ŝin elakompanis,
; Kaj okulojn ĉiujn larm'
sincera banis."

'247 La afablulino nun laŭ lia
peto ; Kondukis Johanon al la
tombmonteto, Kaj lin lasis
sola en la lok' dolora, ; Sur la
karan tombon falis li,
langvora.

'248 Pensis pri la tempo
forpasinta, bela, ; Kiam pure
flamis ŝia kor' fidela. Ŝia
koro dolĉa, ŝia vango ĉarma ;
Kuŝas nun, malvarmaj, en la
ter' malvarma.

'249 Jam krepuskis ruĝa brilo
de la suno, ; Post ĝi aperinte,
la palvanga luno Triste
alrigardis tra l' nebul'
malklara, ; Sin Johan' fortrenis
de la tombo kara.

'250 Tamen, li revenis. Eta
arbo roza ; Kreskis el la ter'
sur ŝia lok' ripoza. De l'
rozujo simpla floron li deŝiris,
; Kaj ekmarŝis, pasis, kaj li al
ĝi diris:

'251 "Vi el ŝia polvi kreskis,
rozo eta, ; Estu nun fidela
vojkunul' sekreta! Ĝis
mond-fin' mi vagos, daŭros
mia vagto ; Ĝis la sopirata de
mi morto-tago."

,& Deknaŭa parto:

'252 Dum la voj' Johano du
kunulojn portis, ; Unu, la
malĝojo, lian koron mordis,
..... Dua estis glavo en la ing'
ĉe l' flanko, ; Tiun rust'
konsumis pro la turka sango.
.....

'253 Iris li kun ili sian
vagvojaĝon, ; Jam la lun'
multfoje ŝanĝis la vizaĝon,
Vestis vintran teron la
printempo flora, ; Kiam li
parolis al la trist' en-kora.

'254 "Kiam vi enuos jam priu
la laboro, ; De tortur' neniam
sata kordoloro! Kial via
mord', se murdi vi ne povas, ;
Iru, eble hejmon pli taŭgan vi
trovas."

'255 Vidas mi, ne venos per vi
morto mia, ; Mi devos min
turni al rimed' alia. Mi al
aventuroj, al danĝer' ekiros, ;
Morton sopiratan eble mi
akiros."

'256 Li, pensinte tiel, lasis for
doloron, ; Ĝi kelkfoje flugis re
sur lian koron, Sed la kor'
fermiĝis, do ĝi preterpasis, ;
Nur guteton larman sur
palpebroj lasis.

'257 Kaj li poste finis ankaŭ
pri la larmo, ; Restis nur la
vivo, sen sopir', sen ĉarmo.
..... Li ĝin portis, li ĝin portis
en arbaron, ; Enpaŝinte tien, li
ekvidis ĉaron.

'258 Tiu apartenis al farist' de
poto. ; Radoj ĝis la aksoj
dronis en la koto. Batis la
ĉevalojn majstro la potfara. ;
"Ja mi ne moviĝas!" - jen
respondo ĉara.

'259 "Bonan tagon, frato!" Lin
Johan' salutis. ; Li rigardon
galan* el okul' elŝutis, Kaj
kolere diris, kaj kun
malafablo: ; "Bonan tagon ne
mi, - havas la diablo!"

'260 "Nu", Johano diris, "jen
humor' ĉagrena!" ; "Kiel ne?
La vojo estis marĉ' malbena.
..... Vanaj estas batoj al
ĉevaloj ŝvitaj, ; De maten' la
radoj staras algluitaj."

'261 "Nu, ni povas helpi, sed
nundiru, frato, ; Kien oni
venas sur ĉi tiu strato?"

Kaj Johan' al vojo montris
braketende, ; Kiu dekstre striis
tra l' arbaro fende.

'262 "Sur ĉi tiu strato? Gardu
vin, mi diras! ; Vi en morton
kuros, se vi sur ĝin iras.
Tiun lokon loĝas gento de
gigantoj, ; Re el ĝi neniam
venos enirantoj."

'263 "Tion, bona homo, nur al mi konfidu, ; Nun ni la aferon de la ĉaro vidu!" Kaj Johan' la Brava la timonon prenis, ; Ĉaron kvazaŭ lude el la koto trenis.

'264 La okuloj grandaj, granda buŝ' de l' viro ; Tamen ne sufiĉis al li nun por miro. Ĝis li rekonsciis, ke li danku kore, ; Tra l' arbar' Johano iris jam tre fore.

'265 Iris, kaj alvenis, baldaŭ post ĉi tio ; Al timigaj kampoj jam de Gigantio. Ĉe la lim' torento fluis; ĝia grando ; Por river' konvenus en alia lando.

'266 Kaj gardist' giganta la landlimon gardis. ; Hu, Johan' la Brava, dum li lin rigardis, Devis tien alten levi la okulon, ; Kvazaŭ li rigardus tre altpintan turon.

'267 La gardist' rimarkis lin en sia subo, ; Kaj ekkriis muĝe, kiel tondr' el nubo: "Se mi bone vidas, herbe hom' sin kaŝas, ; Plandoj ĝuste jukas, tuj mi lin surpaŝas."

'268 Sed dum la giganto lin dispremi penis, ; Jen Johan' la glavon super kap' ektenis. La bubeg' veante tretis sur la feron, ; Svingis for la kruron, - falis en riveron.

'269 "Ĝi okazis, ĝuste kiel mi deziris..." ; Kapon de Johano tia pens' trairis. Kaj li, dum la penso, estis jam kuranta, ; Kaj transkuris akvon sur la korp' giganta.

'270 Tiu ne leviĝis el la fal' bonŝanca, ; Ĝis Johan' atingis al la bordo transa, Li transvenis, glavon svingis kaj atakis, ; Gorĝon de l' giganto lerte li dishakis.

'271 Kaj ja plu ne levis sin la grandegulo, ; Por hejmlandon sian gardi per okulo. Sur okulojn liajn suneklips' descendis, - ; Kies malaperon vane li atendis.

'272 Sur la korp' trrakuris la torento muĝa, ; Ĝia ond' ruĝiĝis, sang' ĝin farbis ruĝa. Kaj Johan' la Brava? Ĝojo aŭ turmento ; Trafis lin? Atendu, klaros post momento.

,& Dudeka parto:

'273 Tra l' arbar' li ĉiam pli internen iris. ; Li multfoje haltis, haltis kaj tre miris.
Ĉar ne ĉiutage ja li vidis tiajn,
; Kiajn nun, irante vojojn Gigantiajn.

'274 Arboj sur pejzaĝo tiel grandaj sidis, ; Ke Johan' ilian supron eĉ ne vidis. El la arbofolioj super la bezono ; Por mantel' sufiĉus ies eĉ duono.
.....

'275 Tie kuloj kreskis ĝis tiela grando, ; Bovoĵ ili taŭgus en alia lando, Kaj amase flugis al Johan' la brava, ; Havis kion fari lia ŝtalo glava.
.....

'276 Kaj la frugilegoj! Hu, eĉ tiuj estis... ; Unu sur la supro de arbego nestis. En distnac' dumejla estis ĝi sen dubo, ; Tamen tiel granda, li ĝin kredis nuboj.

'277 Tiel li vagadis, miris sen mezuro, ; Antaŭ li, jen, foje nigris ia muro. De l' giganta reĝo nigra reĝkastelo ; Antaŭ li nun staris morne en malhelo.

'278 Sen mensog', ĝi havis tiel egan pardonon, ; Ke... ke... mi ne trovas, vere, taŭgan vorton.
..... Sed ja imagebla estas ĝia grando, ; Etan ne farigas por si reĝ-giganto.

'279 Do, Johan' alvenis, kaj meditis jene: ; "Mi ekstere vidis, mi ĝin vidu ene!"
Kaj jam, ne zorgante pri l' danĝer' minaca, ; Ŝovis for riglilon de la pord' palaca.

'280 Do, por vido tie vere estis io! ; Manĝis reĝ' kaj filoj;
kiom, scias Dio. Kion ili manĝas, ja vi ne divenas, ; Pensu ja: rokŝtonojn ili manĝe prenas.

'281 Nu, Johan' la Brava, kiam li eniris, ; Tian manĝfestenon ne tro ekdeziris, Sed la reĝ' giganta, la afabla, bona, ; Jene lin invitis per parol' admona:
.....

'282 "Do, se vi alvenis, bone, manĝu kune, ; Aŭ, se vi ne manĝos, vin ni manĝos nune!
..... Ne rifuzu, ĉar la sekan manĝon male ; Via karn' pistita spicos al ni sale."

'283 Kaj ne tiel sonis la parol' de tiu, ; Ke Johan' ĝin nura ŝerco opiniu. Li konsente diris do kun voĉ' sentima: ; "Nu, la manĝo estas iom nekutima.

'284 Sed, kial ne? cedas mi al via peto, ; Manĝi mi aliĝos al la societo, Mi nur petas de vi solan afablecon, ; Volu por mi rompi pli malgrandan pecon."

'285 Kaj la reĝ' kvinfunton rompis nun de roko, ; Kaj ĝin alĵetante, kriis kun provoko: "Jen do, eta noko, por ke al vi plaĉu, ; Sekvos tuj la knelo, sed ĝin bone maĉu!"

'286 "Sed vi mem ĝin maĉos, per sep sakramentoj, ; Kaj al vi, mi ĵuras, rompos ĝi la dentojn!" Ekkoleriĝinte kriis nun Johano, ; Kaj la ŝtonon svingis per la dekstra mano.

'287 Trafis la ŝtonego kapon de la reĝo, ; Lia cerb' elŝpucis, falis li de l' seĝo. "Por ŝtonmanĝo iun vi ja laste vokis," ; Ridis nun Johano, "vin la knel' sufokis."

'288 Ho, por la gigantoj doloregon portis, ; Ke tiel mizere reĝ' ilia mortis, En malĝoj' faligis ili larmoplumon; Ĉiu larmoguto transplenigus kuvon.

'289 La plej aĝa diris al Johan' dum ploro: ; "Ho, indulgu, indulgu, reĝo kaj sinjoro. Reĝ' ni vin elektas, se vi nin pardonos, ; Servos ni servute, kiel vi ordonos."

'290 "Vol' de frato estas ankaŭ nia volo, ; Ho, indulgu al ni, al servut-popolo!" Nun gigantoj ĉiuj kriis kun petego, ; "Havu servutule nin sub via rego."

'291 Kaj Johan' la Brava reparolis: "Bone, ; Mi akceptas, kion diris vi propones. Sed mi devas iri, vojon plu daŭrigi, Do elektu iun, min anstataŭigi.

'292 Kiun vi elektos, al mi ja ne gravas, ; Nur postulon solan kontraŭ vi mi havas, Se mi vin bezonos iam en danĝero, ; Helpu per plennombra, tuja ekapero."

'293 "Jen fajfilo, Reĝa Moŝto, ĝia sono ; Por ni, servutuloj, estos vok-ordono." La gigant' plej aĝa diris al Johano, ; Kaj fajfilon donis li al lia mano.

'294 Johan' la fajfilon en
tornistran ŝovis, ; Rajte pri l'
triumfo li fieri povis. La
gigantoj ĉion bonan nun
deziris ; Lin adiaŭante, poste li
foriris.

,& Dudekunua parto:

'295 Kiom li jam vagis, mem
Johan' ne sciis. ; Sed ju pli
antaŭen lia vojo striis, des
pli la mallumo sur la mond'
eksidas, ; Foje li rimarkas, ke
jen, li ne vidas.

'296 Estas nokt', aŭ vidon
perdis la okulo? ; Tiel sin
demandis mire la bravulo,
Sed ne estis nokto, nek li iĝis
blinda, ; Landon de Mallumo
estis li veninta.

'297 Sur ĉiel' nek suno, nek
stelaro brilis, ; Jam Johan' la
Brava nur palpante iris.
Ofte flugis io super li pretere, ;
Kvazaŭ flugilparoj zumus
enaere.

'298 Sed la bru' ne venis de
flugilaj paroj, ; Balailon rajdis
sorĉistinaj aroj. La
malluman landon longe en
okupo ; Tenis kaj ĝin regis
sorĉistina grupo.

'299 Tie ili tenas grandan
landkongreson, ; Tien la
moŝtinoj rajdas noktomezon.
.... Ĝuste kolektiĝis nun la
tuta bando ; En la meza mezo
de l' Malluma Lando.

'300 En profundan groton
rajdis la popolo, ; Fajro brulis
meze jam sub kaserolo.
Tiun ĉe l' malfermo de la pord'
ekvidis, ; En ties direkto do
Johan' rapidis.

'301 Kiam li alvenis, jam la
plena roto ; Sorĉistina estis
kune en la groto. Li al
ŝlosiltruo iris piedpinte, ; Pri
aferoj strangaj miris,
ekvidinte.

'302 Maljunulinaĉoj svarme
venis, iris, ; En la kaserolon
ĵetis kaj kuiris
Apuidpendigilajn herbojn,
katovostojn, ; Ranon kaj
serpenton, ratojn, homajn
ostojn.

'303 Kion plu ankoraŭ? Kiu
povus citi? ; Sed nun klare
povis jam Johano vidi,
Kian bandon tiu groto
apartenas, ; Kaj en lian kapon
pens' subita venas.

'304 Li fajfilon volis preni el
la sako, ; Ke li la gigantojn
voku por atako, Sed nun
per la mano ion li ekpuŝas, ;
Li rigardis, vidis, kio tie
kuŝas.

'305 Balailoj estis en amas' sur
tero, ; Kiuj sorĉistinojn portis
tra l' aero. Tiujn li
forportis, kaŝis viglamane, ;
Ke la sorĉistinoj serĉu ilin
vane.

'306 Poste li revenis,
fajfsignalon faris, ; Tuj
gigantoj ĉiuj antaŭ li jam
staris. "Knaboj! Rompu
pordon! Ek! Kaj sen
pardono!" ; Kriis li, kaj tiuj
agis laŭ ordono.

'307 Kia katmuziko kaj tumult'
subita! ; Kuris el la groto
bando terurita. Ĉiu
balailon serĉis, malespera, ;
Sed ne povis trovi: mankis
voj' aera!

'308 Dume la gigantoj ne sidis
ripoze, ; Ĉiu sorĉistinon kaptis
furioze, Ĵetis ĝin surteren
per koleraj manoj, ; Ke
platiĝis ili ŝmace, kiel flanoj.
.....

'309 Kaj plej rimarkinde estis
pri l' afero: ; Kiomfoje krevis
sorĉistin' sur tero, Ĉiam
cedis iom la mallum' ĉiela, ;
Lando de Mallumo iĝis grade
hela.

'310 Preskaŭ plena-lume brilis
jam la suno, ; lasta sorĉistino
estis antaŭ puno. Ŝin
Johan' rigardas: tiu ĉi vizaĝo! ;
Stifpatrin' de Ilno estis la
inaĉo.

'311 "Sed mi mem ŝin
knedos!" Kriis nun Johano, ;
Ŝin elŝiris el la grandegula
mano. Sed la sorĉistino el
la manoj glite, ; Hop, eskapis,
kuris, estis for subite.

'312 "Filo, kuru post la ido de
infero!" ; Al gigant' Johano
kriis en kolero. Tiu tuj
obeis, kaptis ŝin post salto, ;
Ĵetis en aeron, al altega alto.
.....

'313 En hejm' de Johano, ĉe la
vilaĝfino, ; Falis la mortinta
lasta sorĉistino. Ĉiu hom'
malamis ŝin kun malŝatego, ;
Do pro ŝi ne grakis eĉ la
frugilego.

'314 Lando de Mallumo estis
jam lumanta, ; Hela sun'
ekbrilis post obskur'
konstanta. Fari grandan
fajron nun Johan' instigis, ;
Ĉiujn balailojn ties flam'
cindrigis.

'315 Nun li adiaŭis al la
grandeguloj, ; Ilin atentigis pri
l' servut-reguloj. Tiu la
fidelon al li ĵure emfazis, ; Kaj
Johan' maldekstren, ili
dekstren paŝis.

,& Dudekdua parto:

'316 Iris do Johano sur la vaga vojo, ; Lia kor' saniĝis jam el la malĝojo, Ĉar ĉe l' vid' de l' rozo, kiu bruste pendis, ; Ne doloro estis, kiun li jam sentis.

'317 Tiu deŝirita, eta tomba floro, ; De la tomb' de Ilno, kuŝis ĉe la koro. Ion dolĉan tio al Johano donis, ; Se li en rigardo de la rozo dronis.

'318 Tiel nun li vagis. Jam la sun' subpasis ; kaj post si krepuskon sange-ruĝan lasis. Malaperis ankaŭ la krepusko sanga, ; Venis la malkreska luno flava-vanga.

'319 Li ankoraŭ marŝis. Sed subiris luno. ; Nun Johano lace haltis en mallumo, Ian fosmonteton uzis kapkusene, ; Elriprozi grandan lacon ĝismatene.

'320 Li sternaĝis, dormis, kaj li ne rekonis, ; Ke tombaro al li ripoz-lokon donis. Jes, tombar' malnova. En la lok' senbrua ; Luktis ties tomboj kun la temp' detrua.

'321 Venis la noktmezo, horo de l' teruro, ; Ĉiu tomb' apertis buŝon kun murmuro. Kaj fantomoj palaj en tolaĵoj blankaj ; El la tombaj buŝoj estis leviĝantaj.

'322 Tuj ekkantis, dancis ili post apero, ; Sub la piedbatoj treme bruis tero. Sed Johanon nian el la dormo peza ; Vekis nek kantado, nek dancad' freneza.

'323 Kiam lin ekvidis iu tombfantomo, ; Ĝi ekkriis akre: "Hom'! Vivanta homo! Kaptu ni, kunportu la aŭdacan viron, ; Kial li kuraĝis riski la aliron."

'324 Zume venis ĉiuj ombroj de l' submondo. ; Ĉirkaŭ li jam staris minacanta rondo, Brakoj etendiĝis... Sed ekkriis koko. ; Ĉiuj malaperis laŭ la koka voko.

'325 Mem Johan' vekigis pro la kok-alarma. ; Lia tuta korpo tremis de malvarmo. Tombajn herbojn klinis akra vento-spiro, ; Li surpiediĝis por la plua iro.

,& Dudektria parto:

'326 Altan montopinton ĵus
Johan' ascendis, ; La unuajn
brilojn la tagiĝ' dissendis.
Ho, belega estis mond' en ruĝa
ardo! ; Li admire haltis por
ĉirkaŭrigardo.

'327 L' aŭror-stelo estis jam en
sveno morta, ; Jam apenaŭ
brilis la radi' senforta, Fine
malaperis, al suspir' simile, ;
ĉar la sun' alvenis sur ĉielon
brile.

'328 Ĝi alportis lumon en la
ora ĉaro, ; Milde trarigardis
ondojn de la maro, Kiuj
ŝajnis dormi en afabla paco ;
Sur la lula sino de l' senlima
spaco.

'329 Paca estis maro. Sur la
ondoj oraj ; Saltpetolis etaj
fiŝoj multkoloraj. Skvamaj
korpoj per la suno radiantaj ;
Vibris kiel trema brilo
diamanta.

'330 Fiŝkaptist-kabano sur la
bordo kuŝis. ; Maljunulo, kies
barb' genuojn tuŝis, Volis
en la akvo ĝuste etendi reton. ;
Lin Johan' aliris, faris al li
peton:

'331 "Se mi vin tre petus,
maljunulo mia, ; Ĉu vi min
transportus al la bord' alia?

Mi volonte pagus, se la mon'
ne mankus, ; Faru do senpage,
mi korege dankus."

'332 "Fil', eĉ se vi havus,
monon mi ne petas," ; La
fiŝist' afable ĉi respondon
metas, "La profund' de l'
maro sufiĉege donas ; Tiun
bagatelon, kiun mi bezonas.
.....

'333 Sed kio vin ĵetis sur ĉi
bordon? Sciu, ; Fabeloceanon
vidas vi sur tiu! Vin trans
ĝin ne povas porti mia mano, ;
Ĉar ne havas finon
Fabeloceanon."

'334 "Fabeloceanon?" Johan'
reparolas, ; "Ho, sed ja pri tiu
des pli mi scivolos. Nepre
mi transiros, kien ajn mi
venos, ; Mi rimedon lastan, la
fajfilon prenos."

'335 Kaj li jam ekfajfis. Tuj
post la fajf-sono ; Antaŭ li
giganto staris je dispono.
"Ĉu vi povas vadi tra ĉi
Oceano? ; Se jes, min
transportu!" diris nun Johano.
.....

'336 "Ĉu mi povas?" diris la
gigant' kun rido, ; "Tuj! Sur
miajn ŝultrojn grimpu do por
sido! Tiel! Kaj nun kaptu
miajn harojn forte!" ; Kaj li,
kun Johano, iris jam
dumvorte.

,& Dudekkvara parto:

'337 Marŝis la giganto, vadis
sen ripozo, ; Duonmejl
paŝis la pied-koloso.
Daŭris du semajnojn ega ĉi
rapido, ; Sed la transan bordon
ne atingis vido.

'338 En nebulo blua de la
malproksimo ; Foje, jen,
aperis io ĉe l' vid-limo.
"Bord!" Johan' la Brava kun
jubil' ekvortis. ; "Nur insul!"
respondis, kiu lin transportis.
.....

'339 "Ĉu insul"? Kaj kia?"
sonis la demando, ; "Vi ja
aŭdis pri ĝi, estas ĝi Felando.
..... Kaj Felando estas fino de
la mondo, ; Trans ĝi en
Nenion dronas jam la ondo."
.....

'340 "Portu do min tien,
servutul' fidela, ; Mi ja
scivolegas pri Felando bela."
..... La gigant' respondis:
"Bone, mi obeos, ; Sed mi vin
avertas, tie vi pereos.

'341 La eniro estis tute ne
senpena, ; Ĉiun pardon gardas
monstro abomena." "Kiom
vin koncernas? Portu min al
bordo, ; Mia zorgo estos iri tra
la pordo."

'342 Tiel la giganton la bravul'
admonis, ; Plu el ties buŝo
kontraŭdir' ne sonis, Li lin
portis tien, sur la bordon
metis, ; Kaj sin, por reiri, en la
ondojn ĵetis.

,& Dudekkvina parto:

'343 Ĉe l' unua pordo de
Felando bela ; Tri uln-ungaj
ursoj estis gard' kruela,
Sed per pena streĉo de l'
Johana forto ; Baldaŭ unuiĝis
ĉiuj tri en morto.

'344 "Por ĉi tag' sufiĉas jam ĉi
tiu venko," ; Pensis li, sidante
post la lukt' sur benko.
"Mi ripozos iom post ĉi tiu
peno, ; Kaj tra l' sekva pordo
iros je l' mateno."

'345 Kaj kiel li pensis, tiel nun
li agis, ; Kontraŭ l' dua pordo
morgaŭ li atakis. Sed pli
duran lukton tie li renkontis, -
; Al li tri leonoj sovaĝejaj
frontis.

'346 Do li, refaldinte veston
sur la brako, ; Glavon
briligante iris por atako.
Krude sin defendis la leona
trio, ; Sed ilia vivo krevis
malgraŭ tio.

'347 La triumf' Johanon
entuziasmigis, ; Kaj por
senripoza plua lukt' instigis.
..... Sian densan ŝviton li
deviŝis haste, ; Al la tria pordo
paŝis senprokraste.

'348 Helpu Di'! Jen estis
terurega gardo, ; Sangon
glaciigas nura alrigardo.
Ĉe la pordo staris ega
drakserpento, ; Kies buŝ' ses
bovojn glutus dum momento.
.....

'349 En Johano staris firme la
kuraĝo, ; Sed ne malpli estis la
sagaca saĝo. Vidis li: ne
helpos tie glavo lia, ; Do li tuj
ekpensis pri rimed' alia.

'350 Jam la drak' apertis sian
monstran buŝon, ; Por
Johanon kapti, manĝi kiel
muŝon. Kaj kion li faris
kontraŭ la atako? ; Li eksaltis
- en la gorĝon de la drako.

'351 Li en la drakbrusto, pri la
kor' serĉinte, ; Trovis ĝin kaj
pikis tra ĝi glavopinte. Tuj
la drakserpento sternis sin
tremante, ; La rompitan vivon
el si elĝemante.

'352 Kaj Johan' penege devis
nun labori, ; Ĝis li povis
flankon de la drak' trabori.
Fine li elrampis inter kelkaj
veoj, ; Pardon li malfermas, -
jen la land' de l' feoj.

,& Dudeksesa parto:

'353 En Feland' pri vintro oni
eĉ ne scias. ; Tie pomp' eterna
de printemp' radias. Suno
ne mallevas, levas sin alterna:
; Ruĝ' aŭrora tremas sur ĉiel'
eterne.

'354 Feoj kaj feinoj en plezura
sorto ; Vivas por voluptoj, sen
la kon' de morto. Trinkon,
manĝon terajn ili ne bezonas: ;
Dolĉaj kisoj amaj tie nutron
donas.

'355 Plor' de tristo mankas,
sed pro ĝojo-ĉarmo ; El la fe-
okuloj ofte falas larmo.
Kaj ensorbas larmon la
profund' de l' tero; El ĝi
diamanton naskas ter-utero.

.....

'356 Blondaj feknabinoj siajn
flavajn harojn ; Tiras po
fadeno lude sub montarojn,
..... Kaj el tiuj iĝas la metal' de
oro: ; Granda ĝoj' por homoj
strebaj por trezoro.

'357 Fein-okulbrilon tie ĉi
kolektas ; Feinfanoj; el ĝi
ĉielarkon plektas. Kaj se
ĝin jam longa plektis la
febuboj, ; Metas ĝin ĉielen,
por ornam' de l' nuboj.

'358 Lito de l' feinoj estas lit'
el rozoj, ; Ĝojebriaj estas sur
ĝi la ripozoj. La varmeta
spiro de zefir' parfuma ; Ilin
endormigas per lulado zuma.
.....

'359 Kaj Feland' nur estas
ombro de la mondo, ; Kiun
sonĝe vidas la gefea rondo.
..... Se la hom' unue aman
kison ĝuas, ; Tra li la plezuroj
de ĉi mondo fluas.

,& Dudeksepa parto:

'360 Kaj Johan' la Brava tra la
pord' enira ; Paŝis nun, kaj
haltis kun rigard' admira.
Lia vido vibris de la rozaj
briloj, ; Li nur time riskis levi
la pupilojn.

'361 De li la gefeoj tute ne
timiĝis, ; Kun infana mildo al
li proksimiĝis, Kun ridet'
petola, kun parol' miela ;
Gvidis lin en mezon de l' insul'
fabela.

'362 Kiam ĉion vidis jam
Johan' la Brava, ; Kvazaŭ li
vekiĝus el sonĝado rava,
Malesper' subita kaptis lian
koron: ; Lia Injo venis en lian
memoron.

'363 "Do en land' de l' amo kaj
de l' ĝoj' petola ; Tra la tuta
vivo nur mi vagu sola?
Kien ajn mi venos, vidu mi
kun ploro, ; Ke feliĉo mankas
nur en mia koro?"

'364 Meze de Felando kuŝis
blua lago, ; Tien li alvenis
dum la trista vago, Kaj de
l' Brust' la rozon. kiun li iam
ŝiris ; de la kara tombo, prenis,
al ĝi diris:

'365 "Cindroj de l' amata! Mia riĉ' unika! ; Nun mi vin postiros, estu voj-indika!"
Kaj li en la ondojn ĵetis ĝin malĝoje, ; Mem, por ĝin postiri, estis jam survoje.

'366 Sed - kion li vidis! Kia ŝanĝo sorĉa! ; En la lok' de l' rozo ridis Ilnjo dolĉa!
Kuris li en ondojn kvazaŭ en frenezo, ; Kaj li ŝin elsavis el la lago-mezo.

'367 Tiu akvo estis mem la Vivoputo, ; Ĉion revivigas el ĝi sola guto. Kaj el ŝiaj cindroj kreskis tiu rozo, ; Do la akvo vekis ŝin el mortripozo.

'368 Povus mi belvorte ĉion ja pririmi, ; Sed ne la ĝojegon de Johan' esprimi, Kiam lian bruston kuŝis Ilnjo viva, ; Kison sorbis buŝo longe jam soifa.

'369 Bela estis Ilnjo! La feinoj kuris ; Tuj al ŝi admire, kaj pri ŝi plezuris, Kaj el ŝi aklame tuj reĝinon faris, ; Dum Johanon feoj sia reĝ' deklaris.

'370 Inter fea gento, rondo idilia, ; En la sin' de sia Ilnjo beltalia, Ĝis nun lia reĝa Moŝt' Johan' la Brava ; Feliĉege regas en felando rava.)

& Toldi:

< Per melodio #A rekante 17 el 31 batoj kvarfoje por strofo, entute 26 368 paŝoj dum 4 horoj kaj 35 minutoj, aŭ #B rekante 34 el 59 batoj dufoje por strofo, entute 25 270 paŝoj dum 4 horoj kaj 25 minutoj (en jena unua parto el tri). Verkis János Arany (1846). El hungara tradukis Miklós Fehér (1986). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj sed hungareskaj melodioj kaj rekantaĵigante citaĵojn de Iloŝvai. Estas konsilinde komenci ĉiun kanton per ĝia rekantaĵo. Klarigoj (*): '4 Kuvasz (diru kuvas) = hungara bruthundo. '8 Laczfi (diru lacfi) = familia nomo. '9 Buda kaj Pest estis tiutempe apartaj urboj (Rimarkoj de tr.). '43 La scienca nomo de la enhejmaj kanoj estas fragmito. '105 Kampo Rákos estas tereno de famaj historiaj okazaĵoj. '176 Ĝi surdorsen falas, kiel ne singardema infano sur glacio. '184 Laŭ buŝa tradicio. (Rim. de Arany).>

(#Melodioj:

(#A: <1,6:31> (/SoSo SoFa MiDo RelRe SoFa MiDo o; rere redo TiSo LaLa redo TiSo o;

(#Rekantaĵo: Sodo TiLa Sodo TiLa Sodo o SoFa a; SoSo SoFa MiDo ReRe SoFa a a MiDo oh)

)×4)

?

(#B: <1,6:59> (/dodo Tido redoTildo refa3 mimi; redoTido refa mire doTi LaLa a;

(#Rekantaĵo unua: mi3re dore mi re doTi LaSo mi mi i; mi3re dore mi re doTi LaSo Mi Mi i;)

mila lala titi soso fiso o mimi; mila lala titi soso o mire mimi;

(#Rekantaĵo dua: lare e mimi doLa Tido redo LaLa a; lare e mimi doLa redo Tido LaLa a;)

)×2)

)×211) +

(&Strofoj:

,& Dediĉo:

(×:; **La patrin' bedaŭris sian filon ege, ; Tial nutris Nikolaon ŝi sekrete. ;**)

'1 (&A: /Kiel en aŭtuna malhel' – paŝtista ; Fajro flagras en la stepa fono dista, (×: &D) Bild' de Nikolao Toldi flagras same ; El la pasinteco plurcentjara flame. (×: &D)

Kvazaŭ li aperus kun statur granda, ; Uzus li lancegon en batalo sanga, (×: &D) Sonus lia forta voĉo kun fiero; Oni kredus: Sonas tondra Di-kolero. (×: &D))

?

(#B: /Kiel en aŭtuna malhel' – paŝtista ; Fajro flagras en la stepa fono dista, (×: ;) Bild' de Nikolao Toldi flagras same ; El la pasinteco plurcentjara flame. (×: &D×2)

Kvazaŭ li aperus kun statur granda, ; Uzus li lancegon en batalo sanga, (×: ;) Sonus lia forta voĉo kun fiero; Oni kredus: Sonas tondra Di-kolero. (×: &D×2))

'2 Ĉe neceso Toldi ĉiam brava estis, ; Same forta vir' ne ĉiujare kreskis. Se li reviviĝus, inter vi aperus, ; Liajn agojn nun vi sorĉo konsiderus.

Lia madzo pezus eĉ por homtriopo, ; Ŝtonĵetilo, lanco – indaj por ciklopo; Certe konsterniĝus vide nun la homoj ; Pro timigaj ŝildo kaj "surbotaj spronoj".

,&1. Unua kanto:

(×:; **Stangon ĉarorandan li kaptinta estas, ; Jen al Buda vojon li montranta estas.**)

'3 Pro la Sun' la kalva soda tero ardas, ; Gregoj da lokustoj sur ĝi lace fartas,
Eĉ herber' ne ĝermas sur la kampo seka ; Mankas verda loko en la stepo ega.

Deko da servistoj – ombre de la stakoj – ; Ronkas, kvazaŭ orde estus ĉies agoj,
Kvankam tutmalplene, aŭ duonŝarĝite ; Vico da ĉaregoj staras – fojn-avide.

'4 Svelta putbaskulo rigardadas strange ; En la putprofundo akvon priserĉante; Oni kredus: Kulo estas ĝi giganta, ; Sangon de l' maljuna tero nun suĉanta.

Soifantaj bovoj ĉe la trog' siestas, ; Kontraŭ tabanaro militantaj estas, Pro l' varmego ĉiu estas ripozema, ; Verŝas trinkujegon nun neniŭ plena.

'5 Nur junulon solan ni surkampe povas ; Vidi per okuloj, kiun jena trovas:
Eĉ lanug' ne ĝermis ĝis nun sur la vango, ; Tamen pezas ŝultre ĉaroflanka stango.

Vojon rigardegas li al malproksimo, ; Kvazaŭ pri alia kamp' avidus sino. Ĉu sur altaĵeto viva signo staras ; Vojkruciĝe, kiu malpermes-signalas?

'6 "Kial vi subsune staras, juna frato? ; Aliuloj ronkas ombre de la stako; Kuŝas kuvaszhund' kun longa lang' anhele, ; Ĝin ne logas nun eĉ muskaptado vere."

Ĉu rigardas vi la kirloventon tian, ; Kiu post momento provos forton vian? Lekas ĝi la vojon dum kureg' rapida, ; Kiel fumblovanta tubo malsolida."

'7 Ne la kirloventon nun li rigardegas, ; Kiu polvan vojon preterkure lekas: Trans la tur' farita de la vent' el polvo ; Armilaro brilas sub la ĉielvolbo.

Dum arme' aperas tra la polvnebulon, ; Li flugigas ĝemon el la korangulo: Toldi nur la brilon rigardanta estas, ; Koro kaj animo enokule nestas.

'8 "Bela junularo, ora
bravularo, ; Kiel triste vidas
vin mi – kun amaro! Kien
iras vi? Ĉu al milit', batalo, ;
Por kolekti florojn de la fam'
per ŝtalo?

Ĉu vi kontraŭ turkoj, aŭ
tataroj iras, ; Por etern' al ili
bonan nokton diras? Hej,
se inter vi mi iĝus tuj husaro...
– ; ...Ora bravularo, bela
junularo!..."

'9 Tiajn pensojn havas
Nikolao Toldi, ; Zorgoj
avidegan enon volas tordi.
Kial tristo filon de hero'
digestas? ; Ĉar la insidema
frat' kortano estas,

Plenkreskinte kun la reĝo en la
korto ; Nur la tagon ŝtelas
ankaŭ nun Georgo, Dum li
estis nur en ĉi vilaĝ' infano ;
Kaj laboras hejme, kiel
kamparano.

'10 Soldatar' fiero venis el
proksimo, ; Kun ĝi venis
Laczfi mem, la palatino.
Plaĉe sidas li sur virĉevalo
flava, ; Pasamenta estas lia
vesto rava.

Ĉiu lia hom' kun kask' ardeo-
pluma ; Sidas sur selita
rajdĉevalo bruna. Nikola'
rigardas kaj eĉ ne rimarkas, ;
Ke okuloj pro la gap' dolore
fartas.

'11 Sur vizaĝ' de Laczfi
malrespekto sidas. ; "He
kampul'! Al Buda kiu vojo
gvidas?" – Tiuj vortoj
trafas Nikolaon sage, ; Aŭdi
eblas, kiel batas kor' tiktake.

.....
"Ĉu kampul' mi?" pensas li kun
trema gambo, ; "Mi,
kunposedanto de ĉi larĝa
kampo Kun Georgo Toldi,
kiu nur intrigas ; Ĉe la reĝo,
dum li manĝojn surtabligas.

.....
'12 Ĉu kampulo mi?" – kaj liaj
pensoj kreskis, ; Kiuj pri
Georgo tre blasfemaj estis.
Nun sen vort' la trabon kaptas
li ĉe l' fino, ; Per ĝi montras
vojon al la palatino.

Daŭre li la trabon – kiel
bastoneton – ; Tenas, ĉiu mire
vidas ĉi atleton; Ĉu el fer'
fariĝis ŝultro, brako, mano? ;
Sen moviĝo tenas trabon ĉi
infano.

'13 Laczfi ekmiregas pro la
forto kruda. ; Gapas ne nur li,
sed ja armeo tuta! Laczfi
diras: "Estas iu ajn, bravul' li'!
; Knaboj! Kiu ŝatus lin por
lukt' insulti?

Kiu povus teni same ĉi
stangaĉon? ; Montru vojon
same, havu vi kuraĝon!" –
Honte, malhonore, sonas nur
murmuro: ; "Ĉu nobelo luktu
kun kampul-junulo?"

'14 Sed ho kiu luktus kontraŭ
fulmotondro, ; Neĝoblova
vento, uragana ombro?

Kiu ŝatus lukti kontraŭ fulm'
ĉiela, ; Longa, zigzaganta,
brila vipo hela?

Frontu kontraŭ Toldi, se vi
jam ne ŝatas ; Vivon, se pri
mond' de l' Dio enuadas.

Se vin Toldi kaptus, estus tre
dolore, ; Al mortinta via panj'
vi kurus plore.

'15 Longaj, densaj vicoj de l'
arme' foriras, ; Ĉiu nun al
Toldi kelkajn vortojn diras,
..... Ĉiu alridetas per afabla
vango, ; Ĉarmajn vortojn
sendas al li ĉies lango:

Unu jen: "Frateto! Venu al
batalo! ; Multe pli valorus ja
vi sur ĉevalo!" Aliul'
kompate: "Frat', domaĝe estas,
; Ke kampul' la patro kaj vi
samo restas!"

'16 Malaperis jam en polv' la
virtaĉmento, ; Kun ĝi
armilbruo, ĝin forportis vento.
..... Li direkton hejmen
malĝojege prenas, ; Pro la
pezaj paŝoj larĝa kampo
tremas.

Kiel taŭro morna, li tutsame
iras, ; El okuloj liaj nigra
nokto brilas. Ofendita apro
estas li kolera, ; Tuj frakasos
stangon li per mano fera.

,& Dua kanto:

(×:; **Moŝt' Georgo Tholdi
alveninta estis, ; Junan
fraton ĉiam riproĉinta estis.**)

'17 Nikola' baraktis kun
malĝojo granda, ; Sed laboro
estis hejme inundanta,

Penis ĉiu, ĉu la domon trafis
brulo? ; Per kliniĝ' salutis lin
la put-baskulo.

Veis tre bestidoj bovaj, ŝafaj,
porkaj, ; Timiĝinte kriis ĉiuj
birdoj kortaj,

Kuris ĉiu in',
eĉ se malsanaj, penis, ; Ĉu
foiro en la kuirejon venis?

'18 Nun servisto verŝas akvon
al kaldrono, ; Bolas ĝi pro
fajro; jam alia homo

En la
akvon mergas korpon de
kortbirdo, ; Ŝiras li la plumojn,
"ŝtrumpojn" kun malmildo.

Ĉu la ŝafidaro blanka fartis
ŝvite? ; Senfeligas ilin lerta
man subite.

Lard' dikigas
sveltan korpon de l' leporo, ;
Gutas graso, kiel larmoj ĉe la
ploro.

'19 Balanciĝas super flam'
porkid' jam kvara, ; Ankaŭ ĝin
tranĉilo faros tuj senhara.

Oni portas vinon en barel',
felsako, ; Panon vir' alia sur
tabul' el fago.

'20 Kial en vidvina kort' foira
voĉo? ; Longe nekutimas en ĉi
dom' diboĉo!

Ĉu funebr' okazis, morto de
mastrino, ; Aŭ ĉu venis ŝia
vidvinec' al fino?

Ĉu ŝin
enuigis jam la sola stato, ;
Edzon donis al la velka flor' la
fato?

'21 Ne pro morto kuras
tumulteg' bazara, ; Ne trovita
fin' de l' vidvinec' amara.

Oni bakis, rostis, ĉiu nun
solenis: ; Unuenaskit' de l'
domo hejmenvenis.

'22 Moŝt' Georgo estas ja
riĉulo vera. ; Pro trezoroj,
bovoj estas li fieraj.

Servistar' armila, trupo da
husaroj, ; Henaj virĉevaloj kaj
ĉashundaj aroj.

Venis li viziti, kun li kvardek
homoj, ; – Econ de akridoj
havas ĉi personoj, –

Li
profit-duonon volas forfesteni
; Kaj la mon-restaĵon en la
poŝ' kunpreni.

'23 Kun inert' patrinon fil'
Georg' salutis, ; Kvankam eĉ
animon antaŭ lin ŝi ŝutis.

"Kaj alia kie?" – Per demand
malgaja ; Sin al ŝi li turnis pri
'la frato kara'.

"Fojnon li transportas nun, la kompatinda, ; Ĉu li venu?" – "Kial?" – jen li respondinta. Kial?... sonis tiu vorto por patrino, ; Kvazaŭ filo pikus per ponard' al sino.

'24 Kial, kial?... Vole, eble eĉ nevole ; Venas jam la juna frat' kun zorg' enkorre. Tre afer' kun Laczfi lian enon mordis, ; Ĝi hontiga estis, tial li tre zorgis.

Malgraŭ ĉio tamen – je miraklo dia – ; Kontraŭ frat' Georgo mutas buŝo lia; Malamegon venkas en la sino io. ; Mi ne povas diri, kio estas tio?

'25 Ĉar tuj post ekvido kaj neatendite ; Frat' li brakumus – eĉ sen vol' – subite. Sed li Nikolaon puŝas for fiere, ; Turnas al li sian dorson tre leĝere.

En okul' inundas larmoj de l' patrino: ; Ĉu en fil' Georgo nestas ŝtona sino? Knedas man' la manon, tremas ŝia lipo, ; – Vortoj de Georgo frapas, kiel vipo:

'26 "Kiel lukshundeton, same vi karesu ; Filon, ke lin vento blovu, ne permesu! En abund' lin banu sub zorgemo sava, ; Tiel edukiĝos li – stultulo brava!

Laboraro kampa ĝuste nun kulminas, ; Sed ĉi 'mastro' nur en nenifar' obstinas: Li – ĉashunde – sentas grasan manĝodoron, ; Lasas senkontrole tuj la kamplaboron.

'27 Se mi atentigis vin, vi ĉiam ploris. ; Bone li neniam en la kamp' laboris, Kiel kampulaĉo, ĉiam nur siestas, ; Kvankam tiel forta, kiel bov' li estas.

En fenestron metu lin: Jen, kiel graso, ; Kiom tag' post tago iĝos pli amasa!" Korpo de Georgo pro rideg' ektremis. ; Nikolao veis kaj obtuze ĝemis:

'28 "El buŝaĉo via flugis nur mensogo, ; Mankas ĉiu ver' en via monologo; Kiel min vi amas, kara frat' Georgo, ; Tiel tenu Dio vin sub bona zorgo!

....

Ĉu ne taŭgus mi por kamparan', soldato? ; Nek por kampservist', nur por la lasta stato? Bolas gal' ĉar kun vi manĝas frato via! ; Dronu mi! – deziras via kor' envia.

'29 Antaŭ vi obstaklo resti mi
ne volas, ; Se foriri devas mi,
mi eĉ ne ploras, Dekstren
kaj maldekstren larĝas tre la
mondo, ; Min ne ĝenas, ke mi
estu forironto!

Tamen mi kunportos, kiom
mia estas, ; – Heredaĵon mian
ĉu vi ne kontestas'? –
Kiom min koncernas: mon',
ĉeval', armilo, ; Donu frat' kaj
restu kun vi ben' de Dio!"

'30 "Jen bubaĉ' la via, sentu,
ke mi donas!" ; Diras tuj
Georg' kaj frap' survange
sonas. Ĉu en Nikolao ne
troviĝas galo? ; Sed! Venĝem'
lin kaptas kontraŭ frat-rivalo:
.....

Okulparo, kiel ŝtal', fajrerojn
ŝutas, ; Se la pugno frapus, tuj
ĝi ekzekutas, Do Georgo
dorsen paŝas pro ektimo. ; Se
ĉi osta madzo batus, sekvus
fino!

'31 Post la frapo estus friska
lok' sekvanta, ; Estus di-favore
manĝo ne plu manka, Tie
rompiĝinta ost' – eĉ bandigita
– ; Ne saniĝos ĝis la lasta juĝ'
solida.

Kiam al Georgo paŝis li
proksima, ; Flugis vere forta
vekrieg' patrina. Ŝi per
korpo kovras, sirmas nun
Georgon, Eĉ se havas ŝi pro
Nikolao zorgon.

'32 Malstreĉiĝas brak' nun de
l' timiga knabo, ; Dekliniĝas
triste kaj rigard' kaj kapo.
Kvazaŭ cedus lin la febro
frostotrema, ; El la praa dom'
li iras – duonsvena.

Kun koler' ĝis fora korta lok' li
mute ; Iras por sidiĝi morne,
sendiskute. Falas kapo al
la surgenua mano, ; En si mem
ploregas mute ĉi infano.

,& Tria kanto:

(×:; **Pri la frat' – Georgo kolerinta estis: ; Li servistaranon mortiginta estis.**)

'33 Sed ne nestis tristo en la praa domo, ; Ciu manĝis, drinkis, preskaŭ ĝis la vomo. Kiam de la tablo moŝt' Georg' ekstaris, ; ,Servistaro ludon per ĵetlancoj faris'.

Juna sang' kaj olda vin' en ili ludis, ; Per la dekstra mano ili lancojn ŝutis, Inter si ĝenadis moke, laŭtridege; Same fartas danca ĉevalid' engrege.

'34 Kaj Georgo Toldi, sata, kiel reĝo, ; Moŝte ĵetas sin al praa apogseĝo Sub tegmenta rand' kaj lin la bildo flatas: ; Kiel liaj homoj gaje petoladas.

Fraton Nikolaon nun Georg' ekvidis ; Kiu ĉe l' baril' kun trista koro sidis. Tuj Georgon fia emocio kaptas, ; Tiaj vortoj lian servistaron traktas:

'35 "Knaboj! Kio tie ĉe l' baril' siestas? ; Ĉu otid'? La beko subflugile estas! Kaŭras ĝi, aŭ mortis ĉu? Eksciuj knaboj! ; Sonu surbarile ĉirkaŭ ĝi la frapoj!

'36 Kvazaŭ li al hundoj ĵetus leporidon, ; Lia servistaro plu ne havis bridon. Ĉirkaŭ Nikolao tondras jam tabuloj, ; Pligrandiĝas lia tristo en okuloj.

Tre facile povas mense ni diveni, ; Kion oni povas eĉ per mano preni: Lin ĝenadi volas serĉo vitriola, ; Ne tro mankas, ke lin trafu lanc' malmola.

'37 Kvankam ne tre pace, Toldi plu toleras, ; Provas sin konvinki: "Kial mi koleras?" Luktas grandanime li kaj ĉi provokon ; Malatentas, lasas fari plu la mokon.

Tiu aĉular' por li – nenio estus, ; Pro venĝema lia brak' sur ter' ĝi restus, Kiel kontraŭ miloj venki senproblema ; Estis por Samsono per makzel' azena.

'38 Nikola' toleris, dum toleri povis. ; Venĝis li per tio, ke li sin ne movis. Li kondukis, kvazaŭ li nenion spertus ; Ĝis nun falus lancoj, se lin ne avertus

Pri danĝer' la frapo, kiu trafis ŝultron. ; Lin koler' instigis: Venĝi tuj insulton: Estis lia seĝo ŝton' muela, granda, ; Ĝin li estis al la aĉular' ĵetanta.

'39 Flugas peza ŝtono... Kie ĝi haltonta? ; Se falonta estos, kiun mortbatonta? Kuru Toldi, vivon nur la kuro savos, ; Nomon de murdisto pluvo ne forlavos.

Vi forsovaĝiĝos de l' gepatra domo ; Kaj "virapro sola" estos via nomo, Kiu per dentego murdis greg-kunulon ; Kaj timinta venĝon ĝi elektis kuron.

'40 Ŝton' ekflugigita falis el ĉielo, ; Pro ĝi mort' terura sekvis por nobelo, Ĉar ole-premile korpon ĝi detruis, ; El la karnaj ruboj sang-oleo fluis.

Lekis for la sangon seka ter' soifa, ; Okulparon kovris katarakt' masiva, Danĝerego, kiu vivon ĵus estingis, ; Jam doloras tiujn, kiujn ne atingis.

'41 Ĉe Georgo morna iĝis ja okulo, ; Ĉar bedaŭris morton li de l' fidelulo, Sed la kapo ĝojis: Murdis lia frato! ; Por atingi celon favoregas fato!

Insidegan celon, – kies vojo kurba, – ; Kovros por la mondo: Ver' de l' leĝo surda!!! Lin pro murd' prijuĝos tribunal' rigora. ; Lin arestu! – Sonas ordoneg' malmola.

,& Kvara kanto:

(×:; **La patrin' bedaŭris sian filon ege, ; Tial nutris Nikolaon ŝi sekrete.**)

'42 Kiel vira cervo de ĉasist' vundita – ; Kuras al arbaro kun la vund' irita

Ĝis malvarma akvo mildiganta, fonta, ; Kaj serĉatas planto vundon kuraconta.

Ve, la mildiganta fonto estas seka, ; Velkis por la vundo ĉiu planto flega.

Kuras ĝi, sed ĝin nur akraj dornoj ĉifas, ; Forton de la povra di-kreaĵ' plu trivas.

'43 Toldi same vagis, sur la kol' malĝojo, ; Kiu spronis liajn flankojn sur la vojo.

Lia kor' similis al la rajdĉevalo, ; Kiu baraktadas en brulanta stalo.

Kaŝvagadis li sur kana tero marĉa, ; Ripozejo mankis en la mondo larĝa.

Vane li solecon al si serĉi provis, ; Kuracilon por la kormalsan' ne trovis.

'44 Kiel lupo, kiun ŝafgardisto pelis, ; Sin li en kanejon sekan kaŝi celis.

Kion flustris eĉ la kanoj?: En la mondo ; Ne troviĝas same povra vagabondo.

Li sur kana rub' kaj marĉmontetoj kuŝis, ; Por tegmento nur la ĉielvolbo ruĝis,

Kun flugil' ŝirmanta jam la nokto falas, ; El veltolo nigra por li tendon faras.

'45 Tie kaŝvagadis ankaŭ l' idilia ; Songo en la bunta vesto papilia,

Sed ne flugis ĝi por Toldi al okuloj, ; Ĝis tagiĝo, ĉar ĝi timis pro la kuloj,

Pro la pika kan', pro apro vagadanta. ; Sed eĉ pli timigis lin la bruoj granda

De l' pelantoj – venis ĝi el malproksimo – ; Krom la dolorego de la juna sino.

'46 Tamen, kiam ruĝis jam tagiĝo bele, ; Bruoj de l' pelantoj ĉesis subĉiele,

Kiam kuloj sidis – songo kaŝe venis ; Kaj flugilojn ĝi al Nikola' sternemis.

Songmielon ĝi por lia buŝ' elektis, ; Kiun de papavoj ĝi por li kolektis,

Pro dolĉeco ĝia el la buŝ-angulo ; Falis puraj gutoj de saliva fluo.

'47 Ĵaluziĝis tial malsatego
morda. ; Lin rapide vekis do –
manĝemo forta.

Nikolaon ĝi per akra vip'
instigis ; Kaj la tutan kampon
fine traserĉigis.

Serĉis li la nestojn sur la
marĉkampano ; De fulik',
vanelo, mev', anaso, laro.

Ilin li prirabis, kiom nur
atingis, ; Sian malsategon li
per ov' estingis.

'48 Jam malsat', soifo iĝis
forpelitaj, ; Sed la pensoj
restis pri futur' hezitaĵ:

Kien iru li kaj kion li
komencu? ; Kaj apogon peti
kie li intencu?

Ĉar foriri, fuĝi estus tre facile,
; Se la patrinet' ne fartus
maltrankvile.

Ŝin sciigi li do antaŭ ĉio
devus, ; Certe, ke sen tio ŝia
koro krevus.

'49 Dum tri tagoj li jam same
sin vivtenis, ; Kiam post la
dorso kana tinta venis.

Lupo ĉu? Li tamen restis
nenifara: ; Lupo lin ne
mordus, nur la "frato kara".
.....

Venis lia kara servutulo
Bence, ; Kiu serĉis lin dum
tagoj paciencie.

La patrin' lin sendis, li ne
ŝparis haston, ; Trovis kaj
brakumis plöre tuj la mastron.
.....

'50 "Kara eta mastro, fine vin
mi trovis. ; Nur post tagoj tri
mi vin revidi povis,

Sen esper' jam vagis en kanejo
mara ; Kun la pens': La serĉo
estas senreala.

Kiel fartas vi? Ĉu vi ne
malsatmortis? ; Ĉu sovaĝaj
bestoj ĝis nun vin ne mordis?
.....

Jen pansako, prenu, plenas ĝia
sino ; De viando, pano kaj
botel' da vino."

'51 Siajn larmojn viŝis pugne
for fidela ; Bence kaj la
pugnon al la ŝtof' mantela.

Li surgenuiĝis, vice el la pako
; Prenis ĉion, kio estis en la
sako.

Li la karan junan mastron jen
provizis: ; El la sako lerte
tablon improvizis.

Staris sur ĝi pano, vin', viand',
fromaĝo, ; Estis pomoj du la
ruĝa dekoraĵo.

'52 Donis li tranĉilon fust-
ornamente stelan, ; Jen
tagmanĝo, diris li la vorton
belan.

Per la akra ilo Toldi panon
tranĉis, ; Kvazaŭfestan
manĝon li por si aranĝis.

Bence nur atentis kun okul'
ĝojhela, ; Kvazaŭ li mem
manĝus kun plezur' ĉiela,

Ĉar en sama ritmo kune maĉis
buŝo. ; Foje-foje kaptis plor'
lin pro kortuŝo.

'53 Kiam Nikolao jam satiĝis
orde, ; Kolon de l' botelo
Bence tordis forte.

Ĝemis ĝi kaj poste sangogut'
al mano ; Ŝpucis pro la ago de
la veterano.

Nikolaon li per ruĝa vin'
salutis, ; Sed unue el ĝi
kelkajn glutajn glutis.

Poste li per dekstra mano ĝin
prezentis, ; Per alia viŝi buŝon
li intencis.

'54 Vigla iĝis pro la vin' la
maljunulo, ; Liberiĝis lang' kaj
koro de seruro,

Diris historion li pri l' avo
Toldi, ; – Infanaĝe gardis li
ĉevalojn por li, –

Ŝanĝis sin la vort' al patro kaj
patrino, ; Rakontado sekvis pri
Georg' ĉe fino.

Dirus Bence plu, la vortoj eĉ
nun sonus, ; Se lin Nikolao
tiel ne admonus:

'55 "Tristo kaj angoro kreskas
en la koro, ; Vin mi petas bele,
ĉesu jam parolo!

Vi – elguŝigante fabojn – ĉe la
forno ; Ofte rakontadis jam –
anstataŭ dormo

Pri l' heroaj agoj de la patro
kara. ; Ne ekscitis min la
histori' detala.

Scivolemon nur la nokta mez'
estingis, ; Ofte mi al songo je
tagiĝ' nur sinkis.

'56 Kio estis, estis. – Vanas
ĉiu vorto ; Pri feliĉa tempo,
aĉas nun la sorto... –

Homon murdis mi kaj iĝis
kasvaganta. ; Kiam reparaĝos
mia peko granda?

Sed mi kredas Dion, patron de
la orfoj, ; Ŝirmi min kaj gvidi
estas liaj zorgoj.

Nomon de murdisto kreis frata
lango, ; Sed ĝin pura lavos
mia ruĝa sango.

'57 Sentas mi: Ne naskis panjo
min, ke rano ; Estu mi ĉi tie
inter junko, kano,

Aŭ mi kampserviste, servutule
kresku, ; Fojno-transportist' de
iu ajn mi restu.

Mi ne plu ol ĝis la vesperiĝ'
atendos, ; Kiam malheliĝo
ĉiujn hejmen sendos.

Estas antaŭ mi la vasta lando tuta, ; Eĉ la venta sono restos pri mi muta."

'58 Pro la vortoj restis Bence malĝojanta, ; Ke vagados Toldi al la mondo granda.

Li aŭskultis mute kaj lin kaptis ploro. ; Sur la rimenŝuon – unge – pro doloro

/Krucojn li desegnis.
Ekparolis fine: ;)×

"Juna mastro, sed la tuta forvagado ; Ŝajnas esti vere tre malsaĝa ago.

'59 Aŭdu juna mastro, kion nun mi diras: ; Moŝt' Georgo post tri tagoj hejmeniras;

Tiam, kio estis, forgesita estos, ; Vi – reĝeto de la regiono restos.

Ni la viaj estas. For kun ĉi decido! ; Ne nur mastro estas vi, sed nia ido!

Pro kvar viaj bovoj murdos vin sopiro, ; Samajn vi ne trovus eĉ en landfoiro!

'60 Ĉu forlasus vi la amuzplenajn tagojn? ; Kiu levos – krom vi – eĉ du plenajn sakojn?

Kaj la muelŝtonon brake kiu levos, ; Gaprigardi kiun muelistoj devos?

Kara sinjoreto, for neniel iru, ; Vin el koro de la viaj ne elŝiru!

Se senmastre restus praaj dom' kaj korto, ; Trafus vian bonan patrineton – morto."

'61 Vortojn petegantajn Nikola' neglektis, ; Kapon skuis li, se ion ne respektis.

Tamen, kiam sonis Bence pri l' patrino, ; Tio ŝtonon rulis al la fila sino.

Nikolao restis longe mutmiene, ; Al la flustraj kanoj li rigardis ĝeme;

Tiom gapis li al flustraj kanoj ĝeme, ; Dum sur okulharoj larm' ekbrilis treme.

'62 Kvazaŭ li nur viŝus sian frunton ŝvitan, ; Polme viŝis for la gaston nepetitan.

Tio de sur lia fingro teren falis. ; Nikola' al Bence volon jen deklaris:

"Diru bona Bence al la panjo kara, ; Ke la stel' de filo iĝis nun malklara.

Longe ŝi ne vidos min, ne aŭdos famon, ; Kvazaŭ en la tombon metus ŝi infanon.

'63 Tamen mi ne mortis. Al ŝi mi mesaĝas: ; Fil' nur tre profunden sin enmonde kaŝas.

..... Pasos tempo kaj li certe
reviviĝos, ; Pri li mirindegaj
famoj ĉie riĉos.

Ankaŭ pri mi flugos tre
mirindaj famoj, ; Gapos pro la
famoj eĉ la suĉinfanoj;

Kaj en ŝia brusto ĝojsaltados
koro, ; Nur ne krevu ĝi pro tiel
granda ĝojo.

'64 Jen mesaĝo." Sin la fidelul'
ekmovis, ; Al pansak' botelon
– jam malplenan – ŝovis,

Viŝis pura sian poŝtranĉilon
stelan, ; El porlarda tuk' li
faldis pakon belan

Kaj pansakrimenon li surŝultre
metis, ; Post adiaŭ-vortoj jam
la marĉon tretis.

Ofte rerigardis li kun zorgoj
ardaj. ; Fine malaperis li pro l'
kanoj altaj.

,& Kvina kanto:

(×:; **En kanejo marĉa Nikola'
sin kaŝis. ; En kanejo marĉa
Nikolao paŝis.**)

'65 Kuŝas jam la suno trans la
kan-kamparo, ; Surĉiele restis
nur purpurtalaro,

Ter', ĉiel' eknigras, kiel
ĉerkotolo, ; Ĉar la nokto venas
kun venkema volo.

Ankaŭ ĉerkonajlojn batas ĝi
sen ŝparo, ; Sur la firmamento
brilas stela maro.

Nun la nokto serĉas sian lunon
belan, ; Suprenmetas, kiel
kronon arĝenthelan.

'66 Nikola' komencas vojon
ne kutiman, ; Ĉiam pli sin
boras en kanejon ŝliman,

Sed – ĉu per ŝnureg' lin oni
retrotiras? – ; Ju pli for li, des
pli pri l' patrin' sopiras.

Ofte rerigardas, kvankam
senutile. ; Li nenion povis vidi
perpupile.

Tamen rerigardis li... kaj
ekreiris. ; Kor' adiaŭ-diri al
patrin' deziris.

'67 Iris li, iradis reen, sen
kvieto. ; Foje marĉ-monteto
cedis al la treto.

Sub ĝi lupa nesto estis, tial
cedis. ; Du lupidoj pro la treto
ekploretis.

Lin kompato kaptis, ĉar
distretis neston; Li karesis
ambaŭ etajn, povrajn bestojn,
.....

Kiel ŝafgardisto, kiu
instruadas ; Junan hundon, tiel
ilin li nun flatas.

'68 Sed karesi ilin estis tre
domaĝe, ; Ĉar malantaŭ li la
kan' ektintis aĉe.

Venis jam lupino kun timiga
krio, ; Nikolao! Frontas
kontraŭ vi – furio!

Baŭmas ĝi, la buŝon jam
etendis tute, ; Per ungegoj
frapas ĝi alvange krude,

Sangavidaj dentoj klakas,
blanke brilas; Bril' en luna
nokto al fajrer' similas.

'69 Intertempe Toldi kion
eblan faris? ; Ŝutis
pugnofrapojn, ilin li ne ŝparis.
.....

Jam inundis sango de la lup'
elbuŝe, ; Ŝvelis okulegoj el la
nesto ruĝe,

Lango en la buŝo lokon jam ne
trovis, ; Klakaj, akraj dentoj
nur ĝin mordi povis,

Ŝajnas ĝi rabia hund', salivo
sanga ; Estis el sovaĝa ĝia buŝ'
fluanta.

'70 Ĉi duelo stranga Nikolaon
tedis, ; Por batali helpon li de
l' boto petis,

Kiel vira bov', se ĝi per korn'
batalas, ; Batas per pied' li, ke
la lupo falas

Alten, malproksimen; kanojn ĝi
disrompas, ; Kien defalinta ĝia
korpo bombas.

Pum! Kaj ĝemo flugas – pro
rebat' de l' tero, – ; En la lup' ne
restis certe eĉ vivero.

'71 Ĉu diablo estas ĝi, ĉar jen,
defalas, ; Ĝemas, rulas sin kaj
jam denove staras;

Flugas el la gorgo bleko tre
kolera, ; Nun ĝi iĝis preta por
batalo vera.

Lian ŝultron estas unge ĝi
ŝiranta, ; Malfermita buŝo du
manstreĉojn granda.

Premas eĉ la postaj gamboj...
Tragedio! ; Ĉi kruelan beston
neniigu Dio!

'72 Ĉu sufiĉas tiom?... Kion vi
imagas? ; Venas eĉ virlupo,
dorson ĝi atakas.

Kompatinda Toldi, kion vi
inventos? ; Havu cent
animojn, eĉ la lupoj venkos!
.....

Eco de ĉi knabo tre mirinda
estas: ; Kreskas danĝerego, sed
kuraĝ' kunkreskas;

Certe sin li savos, scias mi,
sen dubo ; Kaj neniam estos li
manĝaj' por lupoj.

'73 Lian gorgon mordos tuj la
lup', sed vane, ; Toldi kaptas
ĝian kolon ambaŭne,

Premas li kaj cedas ungoj el la
ŝultro, ; Paraliziĝinta lup' la
finrezulto.

Ŝvelas okulegoj, fluas larma
sango, ; Haltis jam la spiro,
pendas verda lango.

Gia viv' ne fuĝis, restis
enpremita ; Kaj la buŝ' por
ĉiam iĝis malfermita.

'74 Toldi ĝian korpon svingas,
per ĝi frapas ; Al vir-lupo, kiu
ĝuste nun atakas.

Venas ĝi sed trafas bato ĝin
tre forta, ; Estas ĝi kuŝante
sian inon morda.

Ho, mirinde: Jen la vira lup'
ekstaras, ; Sed la frapoj al ĝi
renoviĝe falas.

Tiel ĝin tradraŝas korpo de l'
lupino, ; Ke ne reviviĝos ĝi
ĝis mondfino.

'75 De la sovaĝbestoj Toldi
sin jam savis. ; Por sidloko li
nur marĉmonteton havis.

Ĉe l' piedoj kuŝis korpoj du
lupidaj. ; Ili jam ne spiras,
estas distretitaj.

Kuŝas ambaŭ mortaj lupoj
fore, pare, ; Vidis ilin Toldi en
lunlumo klare.

Al la marĉo fridan lumon
disŝutanta ; Estis plena luno
per vizaĝo granda.

'76 Sidis Nikola' kaj ege
cerbumadis. ; Ne nur tial, ĉar
la lupojn li kompatis:

Strangan lupon donis al li sia
fato, ; Kiu manĝi volas lin –
en bild' de frato.

Kial min la propra frato volas
manĝi? ; Kial frat-pendigon
volas li aranĝi?

Kiam estis mi al mia frat'
domaĝe, ; Ke Georgo montru
dentojn ĉi-sovaĝe?

'77 Ĉi konduto lia estas ja –
sen dubo – ; Multe pli
malbona, ol kondu't' de l' lupoj.
.....

Nur la neston ŝirmis tiu besto
kampa, ; Ne ĝenite estus ĝi ne
atakanta.

Murdi ĝin instigas sole nur
malsato, ; Tuj ĝi restos pace
sen malsata stato.

Nome ĝi el grego kaptas por
ĝi bruton, ; Kontraŭ siaj fratoj
ne aplikas trudon.

'78 Frat' Georgo, kion volas vi atingi? ; Kial volas mian vivon vi estingi?

Ĉu nur frata sango solvus zorgon vian? ; Ĉu ekhavi volas vi bienon mian?

Se eĉ lupoparon mi per mano ĉifas, ; Kial ne lin, kiu pri mi sangsoifas?

Aŭ la homa vivo multe pli rezistas? ; Ĉu nemortigebla ĉi Georgo estas?

'79 Haltu Toldi, haltu, murd-intenco haltu, ; Kontraŭ via frat' ne sangsoife fartu!

Sciu: Frata sang' kaj lia finstertoro ; Krius venĝpostule al la Di-sinjoro!

Se estingus frata sang' la venĝsoifon, ; Certe por vi murdus vi eternan vivon!

Vivas Dio, vidas ĉion el ĉielo, ; Fidu al li punan venĝon de l' afero.

'80 Nun instinkto sia al li ion diris. ; Tuj ekstaris li kaj al la lupoj iris,

Prenas ambaŭ li kaj sur la ŝultron metas. ; Nun li sur danĝeran vojon iri pretas.

Tra l' kanej' li iras haste kaj impete, ; Larĝan koridoron tretas perpiede.

Sur la dorso pendas lupoj – ĝis kalkano; Al patrina domo iras jam infano.

,& Sesa kanto:

(×:; **Panjo de Georgo – ŝi
vidvino estas – ; Filon
Nikolaon bedaŭranta estas.**)

'81 Bele falas al la preĝejtur'
lunlumo, ; Vilaĝgrande blankas
mur' de l' patra domo.

Frukta ĝardenego ĉe la transa
flanko, ; Sur la step' arbaro
sajnus ĝi – pro grando.

Ŝia dormoĉambro estas apud
pordo, ; Kiu malfermiĝas
ĝuste al la korto.

Rosmaren' dekoras fenestreton
flore, ; Tie kaŝrigardas ŝia filo
– sole.

'82 Nikolao rosan
herbokovron tretis, ; Kie li la
lupojn sur la teron metis,

Piedpinte, – kvazaŭ estus li
ŝtelanta, – ; Iras al ŝlosita
pordo surveranda.

Longe aŭskultadas ĉie li, sed
vane, ; Ĉar nur lignovermo
ronĝas tre ĉikane.

Ĉu li frapu? Ĉu ne?... Lia man'
hezitas. ; Eĉ la kuraĝulo time
nun meditas.

'83 Kial nun timemo povis al
li fali? ; Li kuraĝus ja eĉ
kontraŭ drak' batali!

– Pro gardem' ne frapas
Nikola' la pordon, ; Ŝin ne
timvekigi... tio faras zorgon.

.....

Povus esti, ke ŝin trafus tim'
sovaga, ; Ŝi malfermi pordon
estus malkuraĝa.

Se la patrineto ekkriadus time,
; Ŝanĝi vortojn kun ŝi
malsukcesus fine.

'84 Li do siajn lupojn sur la
ŝultron tiras ; Kaj al transa
flanko de la domo iras.

Ene kaj ekstere dormas homoj,
bestoj, ; Eĉ la hundoj dormas
en la pajlaj nestoj.

Malfermitas pord', jen lito de
Georgo, ; Lun' arĝentan tolon
kovras al la korpo.

Vice – antaŭ domo – sub la
tegmentrando ; Kiel ursoj
vintre, dormas lia bando.

'85 Dormas ĉiu, do li ne
hezitas multe, ; Siajn lupojn
metas sojlen li deŝultre,

Lancojn servistgrego ĉe la
muro tenas, ; Ilin Nikolao vice
manen prenas.

Vestojn de l' servistoj najlas li
altere, ; Ili ne leviĝu – ĉe
neces' – libere.

Dormas jen Georgo, apud li la
sabro. ; Se lin ne forportis,
portos tuj diablo.

'86 Rigardadas lin la juna
Toldi-filo, ; Kiel iras en lin
ronke ĉiu spiro?

Sola mana premo pelus for
animon, ; Trovus tuj ronkad'
por ĉiam sian finon.

Nikola pensadas: "Vin mi
murdi povus, ; Estus tre
merite, se ĉi man' sin movus,
.....

Sed, ĉe lasta fojo nun mi ne
domaĝos. ; Eĉ ĉeeston tamen
por vi mi mesaĝos,

'87 Lupa par' anoncos por vi ĉi
viziton." ; Ilin li duflanke
metas sur la liton,

Dume diras flustre: "Baj-baj,
dormu bele, ; Apud via frato
dormu vi fiere..."

Nun li al la panjo iras tra la
pordo. ; Ĉe la tablo sidas triste
ŝi sen vorto.

Pugnojn sur tabulon de la
tablo metis, ; Kapon sur la
pugnojn, tiel ŝi kvietis.

88 Vane kaŝrigardis ŝin la
songo dolĉa, ; Ŝia trist' rezistis
al la forto sorĉa.

Sed ĝi – ankaŭ trompe – nepre
venki penis, ; Ĉar mantelon de
la frosto prunteprenis.

Tiel ĝi enŝovis ruze sin
ĉenuke, ; Vadis ĝis kalkan' kaj
reen, dorson pluge,

Korpon sensentigis, faris ŝin
ebria, ; Fine ĝi sukcesis, venis
dormo ŝia.

'89 Ŝia dormo daŭris tamen ne
tro multe, ; Eĉ brueto pelis for
ĝin senindulge.

Ŝi tuj ekvekiĝis pro l' unua
sono, ; Sed jam kuraĝigas ŝin
la juna homo:

"Kara panj' ne kaptu vin
timemo granda, ; Al la dom'
ne estos mi danĝer-faranta,

– Kvankam nokte, – kvazaŭ mi
fantome venus, ; Scias vi, min
tage oni murdi emus."

'90 Lia voĉo por ŝi portis tuj
trankvilon, ; Premis kaj
brakumis, kisis ŝi la filon;

Sur vizaĝ' sen kisoj loko ne
restanta ; Tiom, kiom sola
groŝo estas granda.

"Ho, rekoni vin en nokta ĉi
apero! ; Pro vi preskaŭ murdis
min la senespero.

Sed – je Di' – nun kial mi ne
estas muta? ; Jen sinjor'
Georgo en la hal' apuda!..."
.....

'91 Tiom diris ŝi kaj haltis ŝia
vorto, ; Ne nur pro danĝer', ŝin
lasis for la forto.

Ŝi brakumis lin kun koro
emocia, ; Longan, mutan
kison donis buŝo ŝia.

Sentas Nikola', ke tremas ŝi,
do bele ; Tenas ŝin, ne falu lia
panj' altere,

Kvankam ankaŭ li mem tre
emociiĝis, ; Eĉ li devis peni,
ĝis rekonsciiĝis.

'92 Resti ĉiel forta! – jen li sin
instigis, ; Sed la nazolobon ĉu
pinglaro pikis?

Kvazaŭ antaŭ nazo oni fajlus
krenon, ; Kies tord' superas
ĉiun lian penon.

Fluis jam la larmoj, fluis jam
sen limo, ; Al vizaĝo de la
kara naskpatrino.

Kiel akvoj, kiuj el du montoj
fontis, ; Kune fluas plu, se ili
sin renkontis.

'93 Revenegis sian forton li
ensine, ; Larmojn al la blankaj
haroj viŝis fine;

Repreninte sian forton li
ekstaris, ; Al la ploregemo iel
finon faris.

Nun al kara panjo diris li
parolon: ; "Iom vi ĉesigu ĉi-
kiseman volon,

Ĉiun mian tempon ŝargas
tasko granda, ; Nun adiaŭ-diri
estas mi volanta.

'94 Ŝajnas senespere, ke mi
hejme restu, ; – Al Georg' la
Dio same kruda estu, –

Nun malbone estus plu inciti
faton. ; Mi foriros, ĉar ne
volas murdi fraton.

Diras mi: La triston lasu vi,
patrino, ; Liberigu vian koron
de la timo,

Mi foriros, tamen ĉiel mi
revenos, ; Kredas mi la Dion,
min li certe benos.

'95 Grandan forton havas mi en
ambaŭ brakoj, ; Ĝin mi ne
perdigos per levad' de sakoj,
.....

Ĉar mi estas filo de heroo
fama, ; Estus granda honto ne
fariĝi sama.

Iros mi al Buda, estos
kavaliro, ; Al la reĝ' prezentos
ion dum turniro,

Kio por la reĝa moŝto estos
rava ; Kaj Georgon trafos
enviego flava.

'96 Tial – kara panjo – bele
vin mi petas, ; Bone estos, se
vi plu al plor' ne cedas.

Eĉ mortint' eterne ne mortinta
restas, ; Kial lin priplori, kiu
viva estas?"

Li parolus eĉ plu al patrino
kare ; Sed la hundoj bojis, li
ekaŭdis klare.

El la hundbojego li konstatis
saĝe: ; Estis hejmenporti
lupojn – tre domaĝe.

'97 Nome kolerigis li la
hundajn trupojn, ; Ĉar li kune
portis hejmen siajn lupojn.

Devis li rapidi pro la
hundbojego, ; Antaŭ, ol vekiĝi
povus servistgrego.

"Mi ne povas resti nun, Patrin'
komprenu, ; Dev' foriri.. vin la
bona Dio benu!

En la mond' vin trafu ĉiam
beno dia, ; Kor' deziras, ankaŭ
en la mond' alia."

'98 "Benu, benu..." Tiom ŝi
diranta estis. ; Kiu kiun benu,
en la pensoj restis.

Scias ŝi, ke vivas en ĉiel'
doktoro, ; Aŭdas li dezirojn,
plendojn de la koro.

Kiam de l' patrino sin la filo
ŝiras, ; Mankas lango, kiu ŝian
triston diras.

Al patrin-anim' la filon ligas
ligo, ; Sentas ŝi: Ŝiriĝas tio ĝis
radiko.

'99 Kreskis tre la bruoj de l'
bojantaj gorĝoj, ; Venis kun
blekaĉo ili ĝis la pordoj.

Tiom – por Georgon veki –
jam sufiĉas, ; Ke la servistar'
kun bru' surpiediĝas.

"Kiu estis? Kiu faris ĉi
skandalon?" ; Li lamentis, ĉar
li trovis lupoparon.

"Certe Nikolao, tian faras nur
li! ; Persekutu, kaptu ĉi aĉulon
tuj vi!"

'100 Ĉu vespeg' kolera iĝis ĉiu
homo? ; Tiel agas ĉiu en la
tuta domo.

Ĉiu serĉas, stumblas unu al
alia, ; Perpiede, rajde, kiel
trup' mania.

Kien, kial kuri? – Scias nur
ĉielo. ; Same kuras nur la
frenezul' sen celo.

"Estu fine ordo!" – jen Georg'
postulas. ; Li ekiras kaj la tuta
greg' kunkuras.

'101 Ĉu patrino aŭdas tiun
venĝ-invadon? ; Sonon de
ĉaskornoj, kriojn,
hundbojadon?

Ĉu ŝi aŭdas: "kaptu!" – jen
Georg' ordonas, ; Ĉu ŝi scias:
"kaptu!" – kontraŭ kiu sonas?
.....

Ŝi nenion aŭdas... Dum
malhel' vualis ; Lin, ŝi pro
senforto preskaŭ teren falis.
.....

Falis ŝi surliten – kapo sur
kuseno – ; Dio scias, kiom
daŭris ŝia sveno.

,& Sepa kanto:

(×:; **Dion tre kortuŝis ŝia lamentado, ; Jen Li: Mi haltigos venĝon de la frato.**)

'102 Kiu jam neniun havas sur la tero, ; Li ne timu, venos helpo el ĉielo.

Kiel Nikolaon nun la Di' protektis? ; Grandan nubon antaŭ lunon li direktis.

Nigris jam la nokto, ĝi al peĉ' similis, ; Terurege tondris, bruis, fulmoj brilis;

Forta fulm' al unu homo sendis morton ; Rapidegan, li ne diris eĉ vevorton.

'103 Ĉi afer' ne ŝajnis ŝerco por Georgo, ; Pro la fajraj fulmoj kreskis lia zorgo;

Do la disajn hundojn korne li revokis, ; Kio ankaŭ liajn homojn al li logis.

Mateniĝis jam, dum kun malseka trupo ; Hejmenvenis li ĝis enireja ŝtupo,

Sed kolero brulis en li pro l' afero: ; Lia kordeziro ne estiĝis vero.

'104 Tiunokte fuĝis Nikola' sen dormo, ; Vidalvide kontra pluvo, fulmoj, ŝtormo.

Nur aŭror' forpelis tiujn per sun-ago. ; Li sur stepo trovis sin ĉe l' hela tago.

Ĉu kun li vagadis tie io plua? ; Nur la brila sun' sur firmamento blua;

Sed rapidis ĝi, lin lasis for – por ega ; Kaj senamikeca, nigra nokt' malseka.

'105 Jam trifoje same... Je la kvara tago ; Grandaj montoj naĝis sur miraĝa lago.

Lia gaprigard' ne surmiraĝe restis: ; Nekonataj de li ĝis nun montoj estis.

Li rapidis, kvankam estis jam tre laca. ; Fine ĉe vesper' la fortikaj' amasa

De la reĝ' aperis por la rigardanto. ; Nikolao estis jam sur fama-kampo.

'106 Tiu fama kampo apud Peŝto kuŝas. ; Lin la vesperiĝo ĝuste tie tuŝas.

Ĉe tombej' okazis renkontiĝ' ilia; Nigris nova tombo antaŭ knabo nia.

Kies tombo nigras, ter' sur kiun pezas? ; Tio Nikolaon eĉ ne interesas.

Sed la longa, nigra vest'... Je Di'! Rebuso: ; Ĉu patrino lia kaŭras ĉe la kruco?

'107 Ne la panjo kaŭris tie, nur simila. ; Ŝtonon malmoligus ploro maltrankvila.

Eĉ pli molas, ol la ŝtono lia koro, ; Do li kompatema iĝis pro l' doloro.

Pro kompat' li iris al la trista ino, ; Ŝin demandis: "Kiun perdis via sino?"

Ŝi – vidvino certe – kun vizaĝo pala ; Fine ekparolis inter plor' amara:

'108 "Kara, ne demandu, perdis mi du virojn. ; Ĵus mi entombigis ambaŭ bravajn filojn.

Ĉeĥo murdis ilin sur Danub-insulo, ; Ho, ne liberiĝu de l' infer' ĉi ulo!"

Haltis vort', eĉ tiom ŝi nur plore diris, ; Balbutante, ĉar ŝin dolorego ŝiris.

Ŝi surgenuiĝis ĉe l' monteto tomba ; Kaj plorego sonis kun ĝemado sombra.

'109 Tio daŭris longe. Nikola' atentis ; Kaj la finon de la ploro li atendis.

Foje – eble ŝajne – cedis jam doloro, ; Ĉar mallaŭta iĝis iom ŝia ploro.

Toldi ekparolis: "Mi tre scivolemas, ; Sed aferon tutan klare ne komprenas:

Kiu kiujn murdis, kial? Vi parolu, ; Ĉu ne restis, kiu ilin venĝi volu?

'110 Ŝi – forgesiĝinta pri la kordoloro – ; Diris inter larmoj plendojn de la koro.

Estis ŝi maldika, fartis lace, pale, ; Nigra okulparo sidis transvuale.

"Ĉu pro sang' postulas sangon via diro? ; Ho, por venĝi sangon jam ne restis viro.

Mia koro iĝis stoplejego seka, ; Kiun senspikigis ĵus falĉilo ega."

'111 Ŝin li ekkonsolis: "Larmoj, ve, ne savaj, ; Ve, ne reviviĝos viaj filoj bravaj.

Trankviliĝu kara, vetas mi je Dio!: ; Morgaŭ venĝos mi mem!" – diris kun pasio.

"Mi afable petas, faru nun oferon, ; Diru tre detale tutan ĉi aferon!

Ankaŭ mi vidvinan patrineton havas, ; Do ne miru, se min venĝa volo trafas.

'112 Do la oldulino streĉis sian forton, ; Plendis al la juna viro sian sorton:

"Sur la turnirejo de l' Danub'-insulo ; Dueladas iu ĉeĥa fortunulo.

Fieradas li kaj malestime
krias, ; Li pri nia gento make
ironias,

Frontis lin por viv' aŭ morto
bravularo, ; El vidvinaj, orfaj
larmoj iĝis maro.

'113 Al turnir' hieraŭ miaj filoj
iris. ; – Pri la brava paro
duonlando miris, –

Kuŝas ili ambaŭ kune ĉi sub
tero, ; Post bonegaj filoj restis
nur sufero.

Tuta land' jam timas, eĉ la
reĝo hontos, ; Se jam morgaŭ
kontraŭ li neniuj frontos.

Ĉar pri nia gento morgaŭ
frumatene ; Jam denove sonos
liaj mokoĝene."

'114 Toldi kavaliran taskon do
ricevis. ; Al la oldulin' plu diri
li ne devis.

Post adiaŭ li en urbon Peŝt'
ekiris, ; Kie grandajn agojn
fari li deziris.

Iris sur la stratoj kun impet' li
haste, ; Kvazaŭ ilin bone
konus larĝe-vaste.

Kvankam nur vagadis tiu
povra homo, ; Sen kvartir', sen
pano kaj kun poŝ' sen mono.

.....

,& Oka kanto:

(×:; **Fuĝon de la frat' la reĝo
ja kompatus, ; Nikolaon en
la korto vidi ŝatus.**)

'115 Faris sian planon jam
Georgo saĝe. ; Diras mi: Li
agis ruze kaj sovaĝe.

Daŭris jam tre longe lia
planfarado: ; Kiel ekposedi
parton de la frato?!

Li direktis tuj al Buda sian
iron ; Por starigi kontraŭ
Nikola' kaptilon.

Elseliĝis li kaj al la reĝo iris ;
Kaj pri l' juna frato ĉi sciigon
diris:

'116 "Mia reĝa Moŝto! Jen
amara tasko, ; Ve, mi vin
sciigi devas sen prokrasto,

Task' amara, ĉar la sang' – ne
akvo estas, ; Mia frato ĉiel mia
frato restas.

Ŝajnigante larmojn li – por
plor-stimulo – ; Prem-puŝadis
forte tukon al okulo.

Ruĝis jam palpebroj pro l'
frotado granda, ; Sed la reĝo
estis larmojn ne vidanta.

'117 Nun Georgon tiaj reĝaj
vortoj trafas: ; "Ĝis nun ne
menciis vi, ke fraton havas!

.....

Kial en la korto lin vi
prisilentis? ; Antaŭ min ne
gvidis lin kaj ne prezentis?"

.....

"Ho Majesto reĝa" sonis ĉi
respondo: ; "Ĉar por mi
funebro estas li kaj honto.

Ve!" – kaj sekvis tiun veon
ĝemo granda, – ; "Reĝfavoron
estas li ne meritanta.

'118 Nikola' dekjara estis,
kiam morto ; Rabis for la
patron kaj li restis orfo.

Mi – anstataŭ patro – lin eduki
volis, ; Iĝu li bravulo, pene mi
fervoris.

Sed li drinkis, stulta kaj
nenifarema ; Restis, kvazaŭ
estus li kampul-devena.

Restis hejme, kvankam forton
ja li havas, ; Sed la lukto, peno
lin neniel ravas."

'119 Jen respond' de l' bona
reĝo: "Ne tro plaĉas ; Via
sinkonduto, ĉar vi lin
damaĝas.

Ĝus vi diris: Estas lia forto
granda, ; Kial li batalon estus
malŝatanta?

Kio estis, estis.. venis nun
okazo, ; Tuj venigu lin al mia
reĝpalaco

En lernejon mian. Se li ne
lernemos, ; Kiel senrangulo
tamen li konvenos."

'120 "Dankon diras mi pro via
reĝfavoro, ; Sed maldigna
estas jam li por parolo.

Ve, perdiĝis mia juna frat'
esence: ; Li nobelan homon
murdis – kaj intence.

Ve, ke mia buŝ' per jenaj
vortoj plendis. ; Li soldaton
mian en la morton sendis."

Falas nun Georg' al ŝton'
sanktuloforma. ; Lin la reĝ'
rigardas kun vizaĝo morna.
.....

'121 Kial ekmorniĝis tre la
reĝvizaĝo? ; Tion nun
demandus kiu – kun kuraĝo?

.....

Ĝusa eksilent' ĉu ŝanĝis
reĝhumoron, ; Ĉar la
Majestulo diris ĉi parolon:

"Por indulg' troviĝas tamen
maniero, ; Venu li al Buda
urĝe – por duelo

Kontraŭ l' ĉeĥo, eble venki li
sukcesos ; Kaj pereos jam de
miaj homoj ĉesos.

'122 Lasu vian fraton veni al
turniro! ; Punu lin, se povos
ĉeĥa kavaliro,

Sed se Nikolao venkos, –
homo brava ; Estas li, – merita
por indulgo sava."

Malfavore sonis reĝa vort' ĉi-
foje, ; Do Georg' 'bonkora'
ĝemis jen malĝoje:

"Ĉi favor' malfruis, ĉar al
vasta mondo ; Fuĝis mia frat',
ve, kiel vagabondo.

'123 Ĉu arbaro estas lia hejm',
aŭ bosko? ; Adiaŭis li nur de l'
pordega fosto.

Li kaŝiĝis tute, sin li mem
ekzilis, ; Dio scias, kien mia
frato iris?"

Kaj Georg' lamentis – plene
de insido. ; – Por bieno frata
pelis lin insido. –

Montris nun kaŝitajn ungojn,
veran volon, ; Kiam ĉi-
direkten turnis li parolon:

'124 "Laŭ ĉi-monda leĝo jam
la frat' perdiĝis ; Kaj bieno lia
por mi herediĝis;

Jam mi rajte povus preni lian
parton, ; Sed toleri eĉ ne ŝatus
mi rigardon

De la malamikoj, kiuj laŭte
dirus: ; "Jen, Georg' la parton
de la frat' dezirus!..."

Pelis fraton li al sorto
vagabonda, ; Por ke lian
parton estu akironta.

'125 Gardu Dio min, ke prenu
mi la lian! ; Ĝenan kalumnion
aŭdu mi envian!

Krome kiu savos min, ke ne
atakos ; Min li, mian kapon –
pro venĝem' – ne hakos?

Tion por eviti jen intencoj
miaj: ; Mi la lian metas al
piedoj viaj.

Via Moŝt' la dignan homon
certe trovos ; Kaj per reĝ-
donaco lin honori povos.

'126 Flatis plu Georgo kaj
kliniĝis forte. ; Sed la reĝ'
divenis nediritan vorte,

Ke Georgo Toldi ion ne
emfazis, ; Ke por kio ĉiu lia
ag' okazis?

Nepre reĝan ĉarton volis li
ekhavi, ; Ĉe diskut-afero per
ĝi volis pravi:

"Jen donac-letero!" – li fiere
dirus, ; Se post temp' indulgon
Nikola' akirus.

'127 Froste alridetas lin la
reĝo saĝa. ; Venis post
moment' al li ideo plaĉa:

"Bone! Frata parto estas
akceptita ; Kaj por havi ĝin –
vi estas plej merita,

Nur kondiĉon solan devas mi
akcenti: ; Se vi morgaŭ tiun
ĉeĥon povos venki!

Fiksu lian kapon al ĉi tiu
muro, ; Mi stampitan ĉarton
donos kun plezuro!"

'128 Ruĝis jam Georgo, pli, ol
kankr' en supo, ; Kovris sunan
brilon por li griza nubo,

Ŝtonsanktula vico antaŭ li
ekdancis, ; Kontraŭ sven'
luktante korpon li balancis.

.....

Frosto sur la dorso tien-reen
kuris, ; Sur la korpo ŝvito kun
la frost' konkuris;

Iĝis li lacega kaj ne restis
sango ; Por satigi kulon en la
pala vango.

'129 Fine ekparolis li per lasta
forto: ; – (Triste li respondis al
la reĝa vorto) –

"Mi al vi donacis ĉion kun
honoro, ; Mi abdikis, restu
pura mia koro."

Post adiaŭ al si vokis li
husarojn, ; Rajdis hejmen por
ke ŝiri siajn harojn,

Bati pugne frunton... Ĉiuj – el
anguloj – ; Lin rigardis: Kiam
ligi lin per ŝnuroj?

,& Naŭa kanto:

(×; **Kuras taŭr', ŝnuregoj
disrompitaj estas, ;
Hepatpec' al Tholdi nun
ĵetita estas.**)

'130 Luno faras jam la Peŝtajn
stratojn lumaj, ; Blankas
domaj vicoj, nigras tuboj
fumaj.

Ŝindaj dom-tegmentoj
nekutime altaj ; Pendas,
kvazaŭ murojn ĝis la ter'
tegantaj.

Kredus ni, ke oni loĝas
subtegmentojn, ; Tial vidas
oni tegment-regimentojn.

Urbomeze oni domojn
etaĝigas, ; Ni sur ili plurajn
tegmentrandojn vidas.

'131 Pro l' vagado multa iĝis
Toldi laca, ; Do eksidis li al
benko ĉepalaca.

Venis gesinjoroj – tuta homa
fluo – ; Ilin rigardadi estis jam
enuo. Pro malĝojo granda
klinis li la kapon, ; – Poŝ'
malplena faris trista nian
knabon, –

Fruktojn, fungojn, ovojn
manĝis li kelkfoje, ; Kion dum
kvar tagoj trovis li survoje.

'132 Bru', krieg' subitaj
scivolemon streĉas: ; Ĉu

brulad', inund', aŭ malamik'
sieĝas?

Nek inund', bruado, nek la
malamiko, ; Sed alio estas
kaŭzo de l' paniko:

El buĉejo kuris virbovego
muĝa, ; Ĉar la hakilega bato
estis fuŝa.

Flaras ĝi la sangon bleke kaj
kolere, ; Kiu fluas sur la
bruston elorele.

'133 Venis buĉistaro kun
diversaj aĵoj: ; Stangoj,
hakilegoj kaj ŝnuregaj maŝoj.
.....

Kiam sonis al la hundoj laŭtaj
vokoj, ; Homoj estis jam en
sendanĝeraj lokoj.

Ĉi buĉej' posedis fortajn sep
sanghundojn, ; Kuris ili,
mordis al la taŭro vundojn,

Tiras voston, bruston kaj
orelojn kaptas, ; Ĉiun
fortostreĉon por la cel'
adaptas.

'134 Kiam unu hundo mordis
kun kruelo ; Doloregan
vundon de l' virbovorelo,

Blekis kaj skuegis sin la besto.
Kraŝoj ; Egaj sekvis tuj por ĉi
'orel-pendaĵoj'.

Flugis jam la hundoj.
Rigardantoj gapas: ;

Hundokorpaj faloj domajn
murojn frapas.

Se en hunda buŝo restis peco
sanga, ; Kun koler' la hundo
estis ĝin mordanta.

'135 Sonas hund-instigaj
vortoj: "Kaptu, kaptu!" ;
Turnas sin la bovo, ke la
hundojn traktu:

Kiu hund' kuraĝas tuŝi ĝin, tuj
jelpas, ; Ĉar ĝin longa korno
foren flugi helpas.

Aŭ ĝin ĵetas korno al apuda
korto, ; Aŭ senviscerigas ĝin
la bata forto.

Kiu farenaĵ' do por buĉistoj
restis? ; Ili mortajn hundojn
instigantaj estis.

'136 Kaj la taŭr' sovaĝa, kiel
ŝtorm', aŭ fato, ; Ne rigardas,
kiel longas tiu strato,

Kiun vidas, tiun pelas ĝi –
muĝante, ; Kuras ĉiu de la
certa mort' fuĝante.

Kri' virina jam pri malesper'
atestas, ; Kaptu, al aliaj ĉiu vir'
sugestas,

Sed por vere bridu mankas
kuraĝulo. ; Ĉiu kaŝus sin eĉ en
la musa truon.

'137 Nikolao sin per fuĝo ne
defendis, ; Li la taŭron sur la
stratomez' atendis.

"He, vi bubo! Kial vi freneze agas? ; Vidu, kolerega taŭro vin atakas!"

Laŭtaj vortoj lian kapon preteriris, ; Vidis li kaj aŭdis, kion oni diris.

Nur kriadu – pensis Nikolao en si, ; Ĉar atent' necesis por la beston bremsi.

'138 Ĝi ekvidis, ke li staras sur la strato, ; Sonis bleko, ŝutis polvon huf-batado,

Tiel plugis teron ĝia korn' per forto, ; Kvazaŭ grenventajon ŝutus ligna forko.

Nun la besto kapon klinas kaj impetas, ; Frontas kontraŭ Toldi, jam ĝi piki pretas.

"Jen por li la fino!" – tiaj vekriadoj ; Sonas el fenestroj de la Peŝtaj stratoj.

'139 Fin' apenaŭ! Al la ter' bategas boto, ; Ekkriegas li laŭ tondra son-eksplodo,

Ĉi lertaĵ' la beston konsternigis forte, ; Dum li ambaŭ ĝiajn kornojn kaptas torde.

Al buĉej' la taŭron li je kornoj tiras: ; "Nu, buĉistoj, venu!" Toldi laŭte diras.

El kaŝejoj ili elrampadas time, ; Stangojn kaj ŝnuregojn kune portis fine.

'140 Al stangeĝ' la beston ili forte ligis, ; Fortajn maŝojn al la kap', pied' aplikis.

Spektantar' – disiris. Estis eniranta ; Eĉ la buĉistar' al ripozej' malgranda.

Al la kap' de Toldi venis nun ideo: ; "Mi tranoktos nun en tiu ĉi buĉejo.

Por kuseno trabo estos oportuna, ; Por kovril' konvenos flava helo luna."

'141 "Kion vi imagas?" – sonas vort' kun moko: ; "Estas ĉi buĉejo ne gastiga loko!"

Oni lin priĵetis per hepato granda – ; "Kaj nun estu al la panja trist' iranta!"

"Savis mi cent vivojn kaj li min priĵetas ; Per almoza pec'..." la knab' en si ripetas.

Lasis li surtere ĝin kaj hundo venis ; Malsatega, kiu dente ĝin fortrenis.

'142 Ire ofte aŭdis li: "Jen, tiu kaptis ; Ambaŭ longajn kornojn, brave li baraktis."

Fine hejmeniris de sur strat' la homoj, ; Kelkaj nur rigardis el pordegaj fonoj.

Sur fenestroj oni fermis jam tabulojn, ; Sur la domprdegoj fermis eĉ serurojn.

Sidis sur la stratoj nur silent' –
malhome... – ; Pensis Toldi:
"Kiam estos jam mi dome?"

.....

'143 Pensoj kirliĝadas en la
fil-animo, ; Antaŭ li svingiĝas
bildo de l' patrino.

Kiam ĉe la lasta foj' li
hejmeniris, ; Kiel ŝi lin kisis
kaj adiaŭ-diris.

Ankaŭ tiam estis nokto mut-
silenta, ; Ankaŭ tiam ŝutis
lumon lun' arĝenta,

Samfermita iĝis al li propra
domo. ; Ankaŭ nun ne donas
al li lokon homo.

'144 Bildo de l' patrino al li
malaperis ; Kaj jam pri l'
vidvino liaj pensoj ŝvelis.

Kiel ploris ŝi kaj knedis siajn
manojn, ; Ĉar la ĉeĥo murdis
ŝiajn du infanojn.

La promes' en kapon venas, ke
li kontraŭ ; Tiu ĉeĥ' turnire
devos lukti – morgaŭ.

Sen kiras' armil' kaj ŝild' mi
kiel frontos? ; Certe tiu ĉeĥ' al
mia voĉ' respondos:

'145 "Kion kontraŭ mi vi
volas?" Kun grimaco ; Moke
li demandas: – "Kie via
madzo?"

Ĉu min oni lasos iri al
turniro?" ; Ĉifonulo flanken!"
– sonos moka diro.

Triste sur la Peŝtaj stratoj iras
Toldi, ; Ĉar la zorgoj volas
lian koron tordi.

Ofte haltas li – la teron fiks-
rigarde, ; Kvazaŭ ion trovi
volus li – hazarde.

'146 Nun subite iĝis vigla lia
vango. ; Kuri lin instigis
bolantega sango.

En tombejon kuris, kiel li nur
povis, ; Kie li vidvinon ĉe la
tombo trovis.

Kuris li, ĉar eble ĉi supozo
pravas, ; Ŝi armilojn certe de l'
du filoj havas.

"Pruntos ŝi kaj povos mi
sukces-rikolti..." ; Sed, ho ve,
forturnis eĉ esper' de Toldi.

.....

'147 Serĉas ĉie ŝin li en la
muta korto, ; Sed vivan' ne
estas tie, nur la morto.

Kie estas nun ŝi?... En la mutaj
domoj ; De la urbo loĝas kiom
mil da homoj?

Sentas li, ke vanas ĉiu vol'
sopira ; Kaj promeso pri la
tasko kavalira.

Estis lia ĵuro nur facila ludo. ;
Petolema sorto! Kial ĉi
konduito?

'148 Ĉar vivantaj homoj pelis
lin el stalo, ; Kuŝas li en friska
kort' de mortintaro,

Tre malsekas ĝi pro rosaj
diamantoj. ; Nokto larmis ilin,
ne la heredantoj.

Kuŝas li, rigardas al la
laktovojo, ; Pri la kaŝrad' li
pensas kun malĝojo.

Ŝajnas, kvazaŭ estus birdo
forflugema ; Eĉ esper' velkinta
en la koro trema.

,& Deka kanto:

(×; **Petis patrineto de
Georgo Tholdi: Panon el
sekal' servisto portu por li.**)

'149 Se diskreditiĝis eĉ esper'
ludema ; Kaj la vigla, povra
koro iĝis splena, Sendas
tamen tiu songon
multpromesan, ; Ke mildigu ĝi
la sorton malkaresan.

Songis Toldi pri la
kontraŭĉeĥa venko, ; Pri
indulgo reĝa... – Jen la ĉef-
evento: Tiom ne validis
gemoj de l' armilo, ; Kiom
ĝojaj larmoj de l' patrin' pro
filo.

'150 Pelis for la songon akra
huf-batado. ; Li rigardis ĉe la
hela lun' al strato, Kiu
ĝuste apud ĉi tombejo gvidis. ;
Sur la strat' rajdantan homon li
ekvidis. Kiun? – Toldi
mem ne kredis ĉekomence, ;
Kiam li konstatis: Tie rajdas
Bence! "He, vi kien iras,
kara Bence olda? ; Di', ĉu
estas mia fat' mizerikorda?"
.....

'151 Jam la servutulo brava vane dirus ; Falsan nomon, ruze vane li babilus. Toldi ŝiras lin de sur la sel' ĉevala, ; Kisas for la polvon de l' vizaĝo pala. Bence estis vere kompatinda homo, ; Ĉar li kredis: "Venis el tombej' fantomo". Por klarigi ĉion Toldi longe penis, ; Ĝis la okazaĵojn Bence ekkomprenis.

'152 Fine li komprenis ĉion kun sukceso, ; Kion ĝis la mort' ne viŝos for forgeso, Restos en memor' la ĉetombeja vojo ; Kaj la ektimiĝo pro la granda ĝojo. Bence – nekredeme – ĉiam plu cerbumis, ; Tutan korpon li de Toldi trafingrumis. Larmoj ekinundis, ekfluegis fine, ; Kiel falas pluvo el ĉiel' senlime.

'153 Toldi ekrakontis pri l' okazintaĵoj, ; Volis li paroli nun pri ĉiuj paŝoj, Tamen – ĉu mirinde? – Liaj vortoj strangis: ; Ĉiu tria vorto pri l' patrin' demandis. "Kiel fartas ŝi? Ĉu trafis ŝin malsano? ; Ĉu malĝojis ŝi pro perdo de l' infano? Ĉu eĉ nun diboĉas hejme frat' alia? ; Kiel lin toleras patrineto mia?"

'154 Al la juna mastro do rakontis Bence: ; "Via panjo fartis bone dekomence, Ĉar la sekvan tagon jam Georg' foriris, ; Malĝojego pro li ŝin neniel ŝiris. Sed vin, Nikola' ŝi ĉiel vidi volas, ; Ien ajn vi iris, – tiel ŝi parolas – Serĉos vin ŝi certe, – jen de ŝi mesaĝo – ; Eĉ, se daŭros mejlojn cent la forvojaĝo.

'155 Ankaŭ min ŝi sendis for – kun jena tasko: ; "Karan Nikolaon serĉu vi kun hasto, En negoc' prizorgu, flegu lin fidele ; Kaj lin servu bone, iru tiucele. Kien ajn li iros, via akompano ; Sekvu lin, vi restu ĉiam ĉe la mano." Dirus Bence plu, sed jam mi devas fini... ; Kiu povus tiom multe nun pririmi?

'156 Ĉi tombejo estos nun la dormohalo. ; Bence donas grajnoj al la rajdĉevalo; Al la sel' ligitaj grajnoj, pan' troviĝas, ; Kiom por la best' kaj homoj du sufiĉas. Eĉ pansak' malgranda de la selo pendas; Ĝis kubuto en ĝin Bence brakon sendas, Post serĉado fine solvas sin sekreto: ; "Jen panet', mi portis por vi ĝin, mastreto.

'157 Ĝin la kara panjo por vi knedis, bakis ; Propramane kaj ŝi mem la sakon pakis, Poste ĝin konfidis al mi – jen ordone: ; Netranĉite donu ĝin al li, – persone!" Donas Bence nun do – kun tranĉil' la panon, ; Toldi ĝin tranĉegus, ne domaĝas manon, Sed ne duoniĝas pro ĝi ĉi paneto: ; La tranĉil' rompiĝas en du – pro l' impeto.

'158 Bence ja trafatas nun de miro ega: ; "Ĉu pro l' vento iĝis tiu pano seka?" Metis li la ferojn unu al alia... ; "Ho, se kunfandiĝus vi..." jen penso lia. Tamen Nikolaon malesper' ne trafis, ; Se li jam enmane hejman panon havis. Rompis senhezite ĝin li, nur per mano; Falas io fera el la mez' de l' pano.

'159 Levas Bence ĝin kun granda miro vera: ; "Ne ferpeco estas ĝi, sed ujo fera!" Ĝin malfermi povas Bence sen ŝlosilo, ; Streĉas li okulojn, gapas buŝ' – pro miro. Vidas en ĝi multajn ormonerojn Bence. ; Venas el la buŝo vortoj tiusence, Ke li maljuniĝis, sed ĝis nun ne spertis ; Tiom da ormono... – forte li asertis.

'160 Kiel tre ekĝojis Nikola' pro l' mono. ; En la mond' nun jen la plej feliĉa homo! Pro l' neatendita ĝoj' li kapriolis, ; Poste pri la sekva tag' pensadi volis. Kiel armilaron, veston li aĉetos, ; Kiel kapon de la ĉeĥo polven ĵetos, Kio, kiel estos?... kio kiomspeca ; Logis lin sorĉeme, kiel sonĝ' karesa.

'161 Kiam ĝoji super ĉio jam sufiĉis, ; Por kalkuli monon ili eksidiĝis. Toldi elujigis unu post alia, ; Kaptis ilin Bence al manplato sia. Bence ekparolis dire al manplato: ; "Ĉu vi ne jukemas pro la or-invado?" "Ĉit! – Mi volas esti ĝuste kalkulanta!" ; Cent la nombro iĝis kaj ne malpli granda.

'162 "Nun aŭskultu pia servutulo Bence! ; Naŭdek naŭ jen, prenu, gardu providence, Sed la centan trinkos ni, ĉar mi soifas. ; Facilanimecon bonhumor' motivas. Forte kontraŭdirus tiu hom' bonega, ; Se la ladbotel' ne estus tute seka. Ros' la eksteraĵon trafas, sed la eno. ; Oni batus fajron per ĝi – sen problemo.

'163 Ne tro malproksime ili iri povis, ; Kiam drinkejton nun konvenan trovis.

Konstruaĵ' malnova, aĉa, eĉ malpura. ; Sur la step' troviĝas eble samobskura. Put' baskula staras sur la korta loko. ; Bence sian beston ligas al la trogo. Nikola' eniras, batas al lintelo ; Tre malalta sian frunton pro malhelo.

'164 "Drinkejestro, he, ĉu dormas vi, aŭ mortis? ; Meĉon, kune vinon kial vi ne portis?" "Mi ne dormas – ('kiun portis nun diablo') – ; Ĉu glaset', aŭ pindo staru sur la tablo?" "Nek glaset', nek pindo, eĉ ne gut' da vino, ; Se ne estos kruĉo ĝi kun larĝa sino!" "Hm!" – la mastro pensis pro la granda kvanto: ; "Estas nun trovata vera vin-ŝatanto!"

'165 Bence el pansako prenas tre aroman ; Manĝon, kio faras apetiton bonan. Manĝas Nikolao, manĝas kun plezuro, ; Homtriop' ne manĝus tiom – dum konkuro. Jam la plena kruĉo sur la tablo staras. ; Toldi, – ĉu por lukto?, – same sin preparas Por duonon el la kruĉ' kvinpinda trinki. ; Bence jen: "Mastreto! Al ebri' ne sinki!"

'166 "Ĉu mi volas, aŭ ne iĝi nun ebria? ; Tute ne koncernas vin afero mia! Dum la ĝojo ŝarĝas saĝo la animon, ; Pelu ni la saĝon for kaj trinku vinon!" Donas li la kruĉon al la veterano, ; Singardeme trinkas li – kun trema mano. Kontraŭ ebriiĝ' li kiel manipulis?: ; Ĉiujn glutojn kaŝe, zorge li kalkulis.

'167 Dum afer' ilia estis, – por plezuro – ; Zimbalona sono ekis el angulo. Muzikist' maljuna kuŝis ĉe la forno, ; Bruo de la gastoj vekis lin el dormo. Toldi kun la kruĉ' en mano tuj eksaltis, ; Dancis li surmeze, nur por trinki haltis. Preskaŭ ruiniĝis jam la domo trema. ; Bence ripetadis: "Estu singardema!"

'168 "Kial singardemo ĝenu nun la sinon?" ; Kaj ĝis lasta guto trinkis li la vinon. "Al la vent' ŝutita estu nun angoro, ; Se nin trafi povis fine bonhumoro! Mastro! Tuj kun plena kruĉ' denove venu, ; Al la maljunul' kun pind' ke li ne tremu!" En la drinkejestro obeemo nestis, ; Li al Bence pindon prezentanta estis.

'169 "Ek! Festenu ni la triston
el la sino, ; Mastro, se vi
dormos, mankos tuj la vino!
..... Fluu vino, trinku ankaŭ
zimbalono!" ; "Ho sinjor',
prefere gin en min, por homo!"
..... "Trinku propran vinon, nun
mi pagos, mastro! ; Trinku do!"
– "Domaĝos ĝi, sinjoro gasto."
..... "Se ne trinkas vi la sukoni
de vinbero, ; Trinku ĉi-
restintan kvanton tuj la tero!"
.....

'170 Vino fluis sur la planko
konsekvence. ; "Ej" nur tiom
diris kap-skuinte Bence.
Dancis Nikola' ĉi senbridega
knabo, ; Trabon de l' plafono
batis ofte kapo. Pro la
bonhumoro kun kriado granda
; Multe li trinkanta estis kaj
dancanta. Sed la veterano
singardemis vere: ; Malpliigis
lia vino nur modere.

'171 Kiam eksilentis Bence,
ne riproĉis ; Toldi, ke en lia
kapo pez' ekloĝis, Sentis
Bence: Stumble kuras for la
forno, ; Dume sinkis li sur
benkon pro malforto.
Kiam ankaŭ nian knabon ĉio
tedis, ; Li eksidis, manojn sur
la tablon metis; Bluis sur
la brakoj vejna ret' ŝvelanta ;
Kaj ekdormis tuj la juna vir'
giganta.

,& Dekunua kanto:

(×; **Portos tuj al unu el ni
morton fato, ; Por mortint'
neniel mankos jam boato.**)

'172 Vestis sin Aŭroro per
velurmantelo, ; Kies ruĝ'
duonon kovras de l' ĉielo.
Ŝi ne fierigis en la vest'
purpura: ; Eĉ rigardis al la
drinkejet' malpura.
Strabokule ŝi tra l' fenestraĉo
gvatas: ; Muzikisto dormas
ene, ŝi konstatas. Ĉu
aliaj?... En la korta mezo
Bence ; Frotas jam ĉevalon
pura – pacience.

'173 Rigardadas ŝi al Buda,
Peŝt' – sen dubo ; Propran
bildon provas trovi en
Danubo. Ŝi anstataŭ sia
bildo tion vidas, ; Ke boato
bruna en la mezo glitas.
Ne alia remas, ol la Toldi-filo,
; Akvon li hirtigas haste per
remilo. Pro la fortaj frapoj
brilaj gutoj falas, ; Kvazaŭ
falus gemoj, kiuj ruĝ-koralas.
.....

'174 Dume li boate jam al
Buda venis, ; Tuj ĝin rapidege
al la bordo ĉenis, Saltis el
boato li por haste iri, ;
Bezonatajn ilojn volus li akiri.
..... Armilaron por si, krome
veston oran, ; Por la
rajdcĉevalo selon multkoloran.
..... Hejme lia estis tiu best',
intence, ; Vole ĝin kunportis
por la mastro Bence.

'175 Ricevitaj ĉio. Granda ŝild'
blazona ; Kaj dolman'
senmanke, tute ŝnur-galona.
..... Estas li kirason, kaskon
aĉetinta ; Kaj eĉ perlan
madzon, kiu jen: sep-pinta.
Havas jam ĵetlancojn li,
lancegon krome, ; – De forĝist'
plej fama preparitajn bone -,
..... Franĝan bridon, selon, kiu
ore flavas. ; Ne malŝpari
vorton: Li jam ĉion havas.

'176 Reveninte Toldi sin
belege vestas ; Kaj per man' la
madzon eksvinganta estas;
Ruĝakapa suno ĵuse vekiĝinta
; Trovas tiun pecon rajte
rigardinda. Ne aspektas
jam la rajdcĉevalo misa, ; Kiel
ĝi alvenis, pro vojpolvo griza:
..... Nigre brilaj haroj kun
skarab' rivalas, ; Sunradi' sur
ili ja surdorsen falas!

'177 Tion jam la besto sur si
mem admiras, ; Kiel franĝa
brid' kaj ora selo brilas.
Toldi surseliĝas kaj ĉeval'
ekdancas, ; Sin rigardas ĝi kaj
ĝoj-fiere prancas. Hop,
nun kvazaŭ vento sin
liberiĝanta, ; Portas li la
mastron kun elano granda.
Ĉar ĵus Toldi al li ne adiaŭ
diris, ; Bence kun okuloj
larmaj post li iris.

'178 Sur la transa flank', en
Buda, ĉe la bordo ; De
Danubo staras tendoj de la
korto. Vicomeze pleje
pompas reĝa tendo, ; Blua
silko estas ĝia mur'; – el cento
..... De aliaj oni ĝin rekonas
bone; Pro la pugnograndaj
kvastoj ĝi impone
Distingiĝas, kvankam multaj
moŝtoj grandaj ; Lukse
pompajn tendojn estas
posedantaj.

'179 Vico de hamakoj karaj,
oraj, belaj ; Staras en la tendoj
kun kusenoj ŝvelaj, Kun
tegaĵ' velura kaj brodaĵoj oraj.
; – Ĉu ekzistas en la mond' pli
porsinjoraj'? – Meze de la
mezo staras apogseĝo ; Geme
dekorita, ĝuste por la reĝo;
Skrapas tapiŝegon dikan el
veluro ; Ne la teron ĝi per
ungoj el eburo.

'180 Ĉirkaŭ l' tenda aro trovas
ni barilon. ; Tiu, kaj soldatoj
por kampul' eniron
Malpermesas. Hejmaj homoj
kaj fremduloj ; Manĝas
transbarile tendojn per okuloj.
..... Fino de l' barilo estas
ĝisrivera. ; Antaŭ l' tendoj
restis granda plac' libera,
Kiu ja sufiĉus eĉ por land-
foiro, ; Se libera estus por la
brut' eniro.

'181 Sur la bordo flagras flag'
ĉe l' akvorando ; Kaj boaton
ligas ĉen' al ĝia stango;
Same sur la Peŝta flanko
flirtas flago ; Kaj boat' luliĝas
ĉe la stang' el fago. Larĝa
voj' la akvo, heĝ' el homoj
kreskas ; Ambaŭflanke, en la
mez' insulo estas. Daŭre
jam sep tagojn murdas tie
ludo, ; Sangavidas ĝi ja eĉ pli
ol hirudo.

'182 El kvartiro sia nun la ĉeĥ'
aperas. ; Sur ĉeval' sidante
laŭte li fieras; Kontraŭ
hungararo sonas moko aĉa: ;
"Ĉu ne restis en la lando hom'
kuraĝa?" Sed subite,
transe, sur la Peŝta flanko ;
Krias ovacio, ĝojas ĉies lango:
..... Rajdĉeval' galope al la
flago iras, ; Lukti nekonata
kavalir' deziras.

'183 Kaska krad' vizaĝon
kaŝas, ĝi el kupro. ; Blanka
plumo filtras sur la kaska
supro. Toldi – alveninte –
sian plumon prenas, ; Jam
soldatoj reĝaj – laŭ regulo –
venas, Portas perboate
transen oficiro ; Tiun plumon
al la ĉeĥa kavaliro. Laŭ
kutim' defion oni jen aranĝis, ;
Ĉar la ĉeĥ' la blankan per
sangruĝa ŝanĝis.

'184 Al la reĝa korto tuj
herold' rapidas, ; Reĝo kaj la
moŝtoj jam surloke sidas.
Ambaŭ kavaliroj sur boat'
samtempe ; Al la turnirejo
remas diligente. Nikolao,
tuj ke plande teron tuŝis, ; Per
pied' boaton sian reen puŝis.
..... Ĉu glitilo kuras sur glaci'?
– La forto ; Frapas ĝian nazon
al la Peŝta bordo.

'185 Pri l' boat' demandas nun
la ĉeĥ' aroge: ; "Ĉu ĝi ne
necesos por vi?" – diras moke.
..... Toldi jen: "La kaŭzo estas
ne alia: ; Tre sufiĉos nur por
unu hom' – la via! Tuj
funebnan finon unu el ni
havos, ; Ĝi ne mankos al li,
kiun morto trafos..." Siajn
manojn preĝe Toldi nun
kunmetas, ; Helpon de la Dio
li humile petas.

'186 Toldi nun: "Bravulo,
donu manon vian, ; Vian
famon mi ne ĝenis, nek vi
mian – Ĝis nun. – Se vi
kaŭzon por koleri konus, ;
Antaŭ via morto kial ne
pardonus? " Sed la gant'
metala de la ĉeĥ' minacas, ;
Ke la fingrojn ĝi al Nikola'
frakasas. Bone, ke
intencon Toldi tuj divenis ;
Kaj pro "l' amikeco" li repagi
penis.

'187 Por la cel' fortegon sian li
koncentris, ; Kiun per
premeĝo al la ĉeĥ' prezentis:
..... Pro la premo ŝrumpis
metallado ganta, ; Ĉiu fingro
estis sangon elŝvitanta.
Kiel en printempo, se la suno
varmas ; Kaj glaci-pendaĵoj de
l' tegmentoj larmas, Same
larmis sangon ĉiu fingrofino. ;
Hu, la ĉeĥon kapfis pro ĉi
forto – timo.

'188 Kaptas nun la ĉeĥon Toldi
– nur per mano, ; Kvazaŭ lin
tir-puŝus forto de titano,
Lian tutan korpon osta krako
regas. ; Surgenuen falis jam la
ĉeĥ' kaj petas: "Estu
indulgema kara filo mia, ; Mia
trezoraro tuta estos via!
Dekdufoje venkis, gajnis mi,
jen ĉio ; Kaj ĝismorte restos
mi ĉe vi – paĝio."

'189 Tre kortuŝe trafis lin la
bela peto. ; "Akceptita, sed ne
por mi tiu predo, Mi
neniom el la gajnitar' bezonos,
; Ĉion al patrinoj de l'
murditoj donos. Iru do –
almoze – nun vi viva restu, ;
Tamen ĵuru, ĵuro forta, prava
estu: Eĉ se inundegos mar'
en via lando, ; Plu ne tuŝos
nian teron via plando.

'190 Ĵuris laŭte pro la tim' la
kavaliro! ; Alboate sekvis jam
la kuna iro. Nun la ĉeĥ' –
inside – dum li vorte flatas, – ;
Glavon kaptas kaj al Toldi
kaŝe batas. En spegul' de
akvo Toldi ĉion vidis, ; Mov'
subita kaj la ĉeĥon li jam
bridis. –etas sin la ĉeĥ' al
ter' – "Ho ve, indulgon!" ; "Iru,
petu Dion, li pardonu ŝuldon!"
.....

'191 De la insidulo li la glavon
prenis ; Kaj indulg' eterna por
la ĉeĥo venis. Propra glavo
tranĉis kapon de la korpo;
Ruĝas jam la glav' pro
posedinta morto. "Ĉeĥa
kap' sur glava pinto!" Jenaj
vortoj ; Sonas ovacie jam sur
ambaŭ bordoj. Ĝojkriadas
ĉiu, per standard' jubilas. ; De
l' montar' en Buda eĥa son'
rekrias.

,& Dekdua kanto:

(×:; Reĝ' al ĉefkortist': Lin vi kortan' elektu, ; Kun monata mono de ĉevaloj dekdu.)

'192 Kiam Nikola' la ĉeĥon mane kaptis ; Kaj kun li la ĉeĥo surgenue traktis, Lian reĝan moŝton trafis je la fojo ; Bonhumor'. Eklarmis li pro l' granda ĝojo. Al la kortaj moŝtoj li la sekvan diras: ; "Tiu ul' – kredeble – laste nun turniras! Trafis pugno pugnon, kiu lin influos, ; Pri hungar' ne moki, tion li instruos!

'193 Kiu estas tiu kavaliro, Toldi, ; Ĉu pri lia nomo povas vi heroldi? Ne ekzistas en la land' heroo brava, ; Kiun mi ne konas, se li estas grava. Sed similan forton al ĉi kavaliro ; Ni neniam spertis en la vivoiro. Timas mi, ke savos – por hontinda malo – ; Ne hungar' honoron de la nom' hungaro.

'194 Estu li hungaro, aŭ germano, polo, ; Se honoron savos de l' hungarpopolo, Estos ja donaco de riĉega grado: ; Tero de l' murdista juna Toldi-frato!" Pro la vort' Georgo ŝvite-froste fartis, ; Kunularvizitaĝonj kaŝe li rigardis. Li konstatis inter ili tuj flustradon, ; Ĝojon, ĉar havanta li murdistan fraton.

'195 Kiam Nikola' la ĉeĥon traĉis, parton ; Pli malgrandan levis sur la glav' en alton, Lia reĝa moŝto tuj ordonon diris, ; Dekduhoma trup' por lin alporti iris. Naĝis sur la akvo jam multflaga barko, ; Al la reĝ' prezentis lin la pompa gardo. Nun la reĝ': "Malfermu kradon tuj, bravulo, ; Diru nomon, montru vangojn por okulo!"

'196 Surgenue Toldi antaŭ l' reĝa seĝo ; Tiel ekparolis: "Ho, majesta reĝo, Ve, mi kaŝvaganto estas, ne bravulo; Scias nur la Di', per kia manipulo Min maljuna frato hommurdisto faris. ; Kiel por perdigi min – li sin preparis? Por ke min anoncu, nun mi venis al vi, ; Peti ŝatus punon, aŭ indulgon al mi."

'197 Vortoj sonas al la reĝo kun kuraĝo, ; Toldi puŝas supren kradon de l' vizaĝo Pala, tamen ruĝa. Tuj la reĝo vidas: ; Sur vizaĝo lia pent' kaj ĝojo sidas. Estas li bravulo juna, bela, plaĉa. ; Jen demand' afabla de la reĝo saĝa: "Ĉu vi Toldi, filo de Lorenzo estas?" ; Nikola' per sia kapo – jese gestas.

'198 Turnas sin la reĝo al la sinjoraro. ; Sonas el majesta buŝo ĉi deklaro: "Min aŭskultu bravaj fideluloj miaj, ; Ĉar ne ŝercon aŭdos tuj oreloj viaj. Jen la juna frato de Georgo Toldi. ; Antaŭ min neniam volis lin li porti, Ruze por bieno frata li intrigis, ; Sian fraton li jam preskaŭ elgentigis.

'199 Scias mi, ke agis li manipulaĉe. ; Nun mi ĵetas al li ĉion alvizaĝe: Li edukis fraton en kampula sorto, ; Ĉar envia estis li pri lia forto. Timis li la fraton, tiun fortan homon, ; Ke li ombros lian nomon kaj renomon, Ĉar... Sed kor' fripona lia ĉu verŝajne ; Scias, kial lasis li la fraton hejme?

'200 Scias mi: Intence ĝenis li la fraton. ; Liaj homoj diris, ke mortigan baton Li devigis, – volis li murdistan staton – ; Kaj aranĝis kontraŭ frato – homĉasadon. Ĉu, Georgo Toldi, reĝo via pravas? ; Kial reĝ', se konojn ne pri ĉio havas?! Vi pri tia frato nur malbonon diris, ; Kiu tian venkon sola mem akiris!"

'201 Sonis ĉi parolo por la moŝtoj plaĉe: ; "Juna reĝo, tamen li prijuĝas saĝe!" Kapklininte aŭdas nun Georg' la veron, ; Volis li kaŝiĝi pro la hont' sub teron. Nun la reĝ' la junan knabon rigardadas ; Kaj indulgintence lian ŝultron batas. Diras li afable: "Vendis vin Georgo, ; Sed jam liberiĝis de li via sorto.

'202 Levu vin! Indulgas nun mi sur la tero, ; Preĝu pro indulgo ankaŭ de l' ĉielo. Mi bienon vian estas redoninta, ; Ĉar sciante, estos mastro vi – plej inda. Ke sinjor' najbar' ne estu malamiko, ; De Georg' farotas tuje nun abdiko Pri la parto sia! – Ĉu insida frato, ; Vi promesis tion al mi – sen persvado?!"

'203 Gaprigardas al la reĝo ja
Georgo, ; Sed nun kontraŭdiri
estus granda zorgo, Ĉar
timige brilas tre okul-profundo
; De la reĝ', faldiĝas kun koler'
la frunto. "Bone, Do
Georg', vi donis vian parton ;
Al la frat'! Pri tio skribos tuj vi
ĉarton, Poste vi foriri el la
urb' rapidu, ; Vin mi en la
korto plu neniam vidu!"

'204 Nikola respondis: "Reĝ'
majesta mia, ; Heredaĵo de la
frato restu lia, Frato, estu
ankaŭ mia part' la via! ; Plu ne
sopiradu lia kor' envia.
Reĝa moŝt', mi petas de vi nun
plezuron: ; Por arme' vi certe
serĉas senrangulon. Jen la
glavo kaj por mi sufiĉos tio, ;
Kion mi akiros – per la help'
de Dio."

'205 Nun la reĝ' jen: "Filo!
Estu ne infano! ; En arme' ne
iĝu vi senranga ano! Mi
elektis jam vin kortejano mia,
; Por ĉevaloj dekdu estos
mono via." Kaj malligas –
dum li laŭdas plu la knabon, ;
Majestulo sian buntan, kupran
glavon. Buntas ĝi – pro
gemoj, ĝia kupro oro; "Por
bravul' merita estas ĉi
dekoru."

'206 Ne ekzistas vortoj, aŭ
donaco riĉa, ; Kiuj pli ol glavo
farus lin feliĉa. Ĝin ne
intgerŝanĝus kontraŭ riĉ', aŭ
mono ; De Dario tiu
simplanima homo.
Nikolao pensis pri belega
danko, ; Sed ne trovis bonajn
vortojn lia lango. Tamen
ne koleras nun la reĝo saĝa, ;
Ĉar la simpla homo al li estas
plaĉa.

'207 Por ke ĝoj' de Toldi estu
tutsenmanka, ; Ĉiu kor-deziro
efektiviĝanta, Kvazaŭ
komenciĝus sonĝo de la sino:
; Venas tra la pordo de l' baril'
– patrino! Li forgesas ĉion,
kuras en ekstazo, ; Premas ŝin
li milde al la Brust-kiraso.
Staras ŝi kaj fil' sen larmoj,
rid', parolo, ; Nur la oldan
Bence kaptas tre la ploro.

'208 Kaj ĉe fin' komuna ĝoj'
kortuŝe granda ; – Kiel nub'
kolera, pezon elverŝanta –
Faris, ke inundis ilin
larmofluo. ; Ŝi – liberiĝinte –
diris al junulo: "Bela ido,
kiun mia koro kovis, ; Dank'
al Di', refoje vidi vin mi povis.
..... Kiel belas vi en vesto
kavalira. ; Jen vin tial kreis
Di-sinjoro nia."

'209 Nun la filo: "Panjo, vi pri
mia diro ; Rememoru, ke mi
iĝos kavaliro; Tamen mi
ne mian propran forton dankas:
; Di-favoron, kiu por mi tiel
grandas." Kun Georg'
loĝejon nun ni interŝanĝos, ;
Li la pluan vivon en vilaĝ'
aranĝos, Eble repaciĝos al
mi koro lia. ; Sed se ne, li
restu ĝis la mort' envia.

'210 Tiel sian panjon amis ĉi
infano, ; Kiun sag' neniam
trafis de la amo; Vivis li
sen ina amikeco longa, ; Li
neniam volis esti edziĝonta.
..... Li timiga estis al la
malamikoj, ; Antaŭ li falegis
ili, kiel spikoj. Ŝirmis li la
reĝon, malfortulojn, landon, ;
Pri l' heroaj agoj bardoj verkis
kanton.

'211 Sekvis fuĝ', se lia voĉ'
kolere sonis, ; Sed li eĉ
ĉemizon al amiko donis.
Se la reĝon, landon malamik'
ne spitis, ; Li ĉe vin' en gaja
rond' volonte sidis. Mon'
ne restis post li, nek trezoroj,
tero, ; Nek infanoj kaj pro
heredaĵ' kverelo. Kio ol
trezor' de l' mondo pli valoras:
; Lia nomo restis kaj por ĉiam
gloras.)